

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

2


1994

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Maljuna arbo kaj blanka pagodo

de YAN JIN

INTER NI

INTERESAJ ARTIKOLOJ

Mi ne estas ĵurnalisto, verŝajne pro tio ĉiu artikolo en EPĈ/93 estas por mi bela kaj interesa. Ekz. tre interesa estas la artikolo “En Vilaĝo kun Moroj kaj Kulturoj de la Ĉinaj Nacioj” (1/93). Belaj fotoj, kompreneble.

NEŠIĆ JOVAN
(Serbio)

Mi estas tre kontenta pri la enhavo de EPĈ. La plej interesa artikolo estas “Geedziĝa Moro de Tuĝa-oj”.

FRANTIŠEK MOLÍK
(Ĉeĥio)

Ege interesas min la 18 artikoloj, kiuj detale priskribas la veturadon “Laŭ Antikva Vojo al Tibeto”. Mi encerbumis multon pri viaj geografiaj lokoj, antikva historio, popoloj kaj urbaj aspektoj.

Vere mirigis min la artikolo “Pri la Maŭzoleo de Qin-dinastio kaj Argilaj Militistoj kaj Ĉevaloj” pro ties historia kompetenteco.

MAZAUD GEORGES
(Francio)

Tre interesaj estas artikoloj kiel “Monhelpo al la Eduka Afero”, “Surplacaj Artoj en Tianjin” kaj diversaj aliaj... Bonega estas la rubriko “Por Komencantoj”, kiu utilas en nia grupo.

PERAULT RAYMONDE
(Francio)

Eksterordinare interesaj estas la artikoloj “Moroj de Ĉinaj Nacioj”. Bonegaj estas vidaĵoj de Ĉinio. En ĉiu ekzemplero estas tre belaj kaj interesaj pejzaĝoj. Oni ne povas konstati, kio estas pli bela, ĉar ĉio estas malsama.

ROMAN SIEMIATKOWSKI
(Pollando)

Mi legas ĉiujn artikolojn kaj ĉiam kun granda malpacienca atendas novan numeron.

Tre interesaj estas la novaj rubrikoj de via revuo — “Itinero Proponita”, “Verdigo en Ĉinio” kaj “Historia Mistero”.


ANDRZEJ GIELERT
(Pollando)

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Ĉinio strebas al altaj teknikoj de la mondo
- 6 Por utiligi la Flavan Riveron
- 8 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*
Ĉinio kontraŭ koruptiĝo
- 10 Disvolviĝo de la ĉina kardiokirurgio
- 12 *ESP-NOVAĴOJ*
- 13 *SUR NIA LIBROBRETO:*
Imitinda ekzemplo
- 14 *VOĈO DE ESPERANTISTOJ:*
Misiro en poezian ĝardenon
- 16 Esperanto-movado en Xinjiang
- 17 *POR KOMENCANTOJ:*
Malgranda stacio
- 20 *ĈE YANGZI-RIVERO:*
Nantong prosperiĝas danke la havenon
- 24 Fosilia dinosaŭro en Pekino
- 25 *ARTOJ DE ĈINIO:*
Ĉina olepentraĵa arto en progreso
- 28 Marhirundo
- 29 *SUR STRATOJ:*
Alilandanoj en Pekino
- 32 Profesia edukado en Ĉinio
- 36 Por havigi domojn al urbanoj
- 38 *ĈINA KULTURO:*
Filozofio de Laozi — Observu la leĝojn de la naturo
- 40 Helpema varma lineo
- 44 *SENTENCOJ DE FILOZOFOJ:*
Sentencoj de Zhuangzi
- 45 *MEM PROVU*
- 46 Fabrikanto de skorpia veneno
- 47 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 48 *KURANTAJ AFEROJ*
- 50 *AMATOROJ:*
Amo al Yuhua-ŝtonetoj
- SUR LA KOVRILO:*
Floroj sub ombrelo (Olepenraĵo)
de Su Xinhong
- 2 Maljuna arbo kaj blanka pagodo
- 18 Reproduktaĵoj de la Imperiestra Palaco
- 34 La Printempa Festo en la kamparo
- 42 La vivo de maljunuloj
- SUR LA DORSKOVRILO:*
Ravino ĉe neĝmonto

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Nantong (p. 20)
2. Qinghai-provinco (p. 6)
3. Shandong-provinco (p. 6)
4. Nankino (p. 50)
5. Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono (p. 16)



Ĉinio strebas al altaj teknikoj de la mondo

EN la komenca periodo de la 80-aj jaroj multaj evoluintaj industriaj landoj ellaboris sian strategian planon por disvolvi altajn teknikojn, kiuj leviĝis pli kaj pli rapide kaj ludas pli kaj pli gravan rolon en internacia konkurenco. Ankaŭ Ĉinio urĝe bezonas altajn teknikojn por sia modernigo. Sed kiel ĝi entreprenis la laboron?

Marton de 1986 Wang Daheng, Wang Ganchang, Chen Fangyun kaj Yang Jiachi (Jang Ĝjaĉi), sciencistoj kaj membroj de la Ĉina Akademio de Sciencoj, prezentis proponon al la ĉina registaro, ke Ĉinio devas sekvi la internacian

disvolviĝon de la strategiaj altaj teknikoj.

La propono estis tuj akceptita. La Ŝtata Konsilantaro organizis pli ol 200 famajn fakulojn por studi la temon. En oktobro ili ellaboris la konkretan planon "Programo de Studo kaj Disvolvo de Altaj Teknikoj", alinome "Plano 863", kiu estis oficiale sankciita de la ŝtato novembre.

"Plano 863" difinis ŝlosilajn temojn kaj projektojn de altaj teknikoj de sep ĉefaj fakoj:


1. En biologia tekniko. En la venonta jarcento oni kontentigos la bezonon de nutraĵo de la popolo kaj plibonigos ilian sanstaton. La ĉefaj taskoj estas esplori novajn

altproduktajn kaj bonkvalitajn viruso-imunajn specojn de animaloj kaj vegetaĵoj, ellabori proteinan projekton, produkti novajn medikamentojn kaj vakcinojn kaj praktiki geno-terapijon.


2. En astronautika tekniko. Oni praktikos la politikon de modera disvolvo kaj limigita spurado kaj ĉefe organizos studon kaj esploron de granda transporta raketo.


3. En informa tekniko. Oni disvolvos avangardajn teknikojn vaste aplikeblajn kaj ĉefe studos la intelektan komputoran sistemon, mikroelektronon, fotoelektronajn aparatojn kaj sisteman integradon de fotoelektrono, informo-ricevan kaj informo-traktan teknikojn.

Astronaŭtikaj fakuloj kontrolas spurmezuran aparaton.



La plej granda ĉina teleskopo





Oni manipulas la unuan ĉinan komputeron por verki en la ĉina lingvo.

4. En laserradia tekniko. Oni metas sian atenton ĉefe sur alt-efikajn kaj bonkvalitajn laserradiajn aparatojn kaj iliajn prilaboradon, produktadon kaj aplikadon.

5. En aŭtomata tekniko. Oni ĉefe studos la teknikon de sinteza aŭtomata produkta sistemo de komputoro kaj la teknikon de intelekta roboto.

6. En energia tekniko. Por solvi la problemon de nesufiĉo de energio, necesas trovi novajn energifontojn, studi kaj apliki la teknikon de termonuklea reaktoro kaj la teknikon de produktado de elektro per magneta fluidaĵo.

7. En la flanko de novtipa materialo. Oni studos kaj disvolvos materialojn de bon-efika strukturo, novajn ŝlosilajn alt-teknikajn materialojn, materialojn kun specialaj funkcioj kaj la sciencan de modernaj materialoj. Surbaze de tio progresos la altaj teknikoj de aliaj fakoj.

Ĉinio praktikis "Planon 863" kelkajn jarojn kaj atingis grandajn sukcesojn en la tereno de altaj teknikoj.

estas la tria lando post Usono kaj Francio, kiu povas produkti alt-energian kaj malalt-temperaturan fuzaĵon de raketo, kaj cetere ĝi estas unu el la kvin landoj povantaj lanĉi senmovan sateliton.

En studo de superkondukto Ĉinio atingis la internacian avangardan nivelon. Ĉinaj sciencistoj sukcese kreis alttemperaturan superkonduktan membranon de itrio, bario, kupro kaj oksigeno, kiu rilatas rekte al la disvolviĝo de informo-traktado, mikroelektrona tekniko kaj komputora scienco. Krom Ĉinio, nur malmultaj landoj kiel Usono, Japanio kaj Germanio povas fari tian materialon.

Ĉinio sukcesis fari eksperimenton por disigi uraniajn izotopojn per laserradioj kaj povas konformigi la entenon de uranio, hejtajo de nuklea elektrejo, al la bezono de la elektrejo per nur unufoja disigo. Tio gravas por la progreso de la ĉina nuklea industrio. Jam funkcias la nukleaj elektrejoj Qinshan (Ĉinŝan) kaj Dayawan konstruitaj de Ĉinio mem.

Ĉinio sukcese faris grandan op-

Nun Ĉinio jam enviciĝis inter la landoj kun plej avangarda aviada tekniko. En la mondo nur Ĉinio, Usono kaj eks-Sovetunio posedas la teknikon revenigi sateliton. Kaj Ĉinio estas distingiga tiuflanke. Ĝi havas raketon povantan porti plurajn satelitojn kaj starigis kompletajn satelitajn mezurmonitorajn retojn teran, maran kaj aeran. Ĉinio

tikan astronomian teleskopon, per kiu oni povas observi stelojn malproksime de la Lakta Vojo. Per radioteleskopo oni povas observi ne nur sunradiojn, sed ankaŭ kosmoradiojn. La esploro pri la suno jam fariĝis aparta kaj multmaniera. Novaj teknikoj aplikiĝas en la astra mezurado. La disvolvo de la spaca astronomio jam eniris en la tagordon kiel nova tekniko.

Rapide progresis tekniko de optikaj fibroj. Ekde 1989 la telekomunikado per optikaj fibroj antaŭeniras grandpaŝe. La 15-an de oktobro 1993 ekfunkciis la ĉefa telekomunika linio de optikaj fibroj inter Pekino en nordo kaj Kantono en sudo. Ĝi longas 4 700 km, la plej granda en la mondo, povas enhavi pli ol 105 000 longdistancajn telefonajn lineojn. Ĉinio, same kiel iuj evoluintaj landoj, povas fabriki senmalvarmigan laseron kaj longondan lavangan fotodiodon.


Ĉinio profunde studis la komputoran traktadon de la ĉina lingvo kaj vaste disvolvis la teknikon. Per nova voĉ-distinga sistemo oni povas voĉe enmeti 80-100 ĉinajn ideografiaĵojn en komputoron ĉiuminute. Viglas studo pri homa intelekto kaj kona inĝenierio. Profundiĝas studo pri esprimo kaj akiro de kono, aŭtomata rezonado per kono, kompreno kaj traktado de natura lingvo, vidpovo de komputoro kaj tradukado per maŝino.

La unua ĉina superkomputoro "Lakta Vojo II", kiu povas fari miliardon da kalkuloj ĉiu sekunde, jam muntigis en la Ĉina Ŝtata Me-tea Centro kaj servas por vetera prognozo en la meza periodo. Tiel Ĉinio fariĝis unu el la malmultaj landoj povantaj fari 5-7-tagan veteran prognozon. Tio profunde influos la metean, eĉ tutan scienc-teknikan aferon.

Cetere, praktikado de "Plano 863" ankaŭ alportis grandajn sukcesojn al elektron-pozitona kolido kaj laboratorio de sinkrona radiado. Vizaĝe al la defio de la novteknika revolucio, Ĉinio strebas antaŭen kiel eble plej rapide. ■

ZHU TANG:

Por utiligi la Flavan Riveron



Barago de la akvorezervejo Liujiaxia

LA Flava Rivero longa je 5 464 kilometroj estas la dua plej granda en Ĉinio, post Yangzi-rivero. Ĝi trafluas Qinghai (Ĉinghaj), Sichuan kaj aliajn ses provincojn kaj regionojn kaj enfluas en Bohai-maron en Shandong-provinco. La Flava Rivero estas rivero enhavanta plej multe da sablo en la mondo. Historie ĝi multfoje inundis pro sablo-sedimento, kio alportis profundan katastrofon al la ĉina nacio.

En la lastaj 40 jaroj la ĉina popolo faris al ĝi reguligon kaj akiris rimarkindan sukceson. La areo de la irigaciataj kampoj en ĝia baseno kreskis de 0.8 miliono da hektaroj en la 50-aj jaroj al 6.3 milionoj da hektaroj nuntempe. 48% de la akvofonto de la rivero estas utiligataj kaj per tio ĝi fariĝis unu el la plej multe utiligataj riveroj de la tuta lando.

De la 50-aj jaroj la ŝtato investis sume 4.5 miliardojn da juanoj por reguligi la Flavan Riveron. Oni fortikigis la digon en ĝia malsupra baseno je 1 396 kilometroj, kio faris la sablo-sedimentan “pendantan riveron” fortika “Granda Muro ĉe la rivero”. Statistiko

montris, ke nur tio evitigis ekonomian perdon de pli ol 50 miliardoj da juanoj kaj donis sancon laŭplane disvolvi ekonomion al la provincoj kaj regionoj ĉe la rivero. La ok provincoj kaj regionoj trafluitaj de la Flava Rivero estas kun malmulto da pluvokvanto, kaj per akvo de la Flava Rivero oni povas altigi la produktokvanton de greno, kotonon kaj aliaj plantoj de tiuj regionoj. La registroj de la provincoj kaj regionoj ĉe la rivero difinis la celon disvolvi la ekonomion ĉe la Flava Rivero. En Hetao-regiono de Ningxia (Ningŝja) kaj la Interna Mongolio, Henan kaj Shandong en la malsupra baseno de la rivero oni faras ĉefe irigacion per akvo kondukita el la rivero.


Granda ŝanĝiĝo okazis en Hetao-ebenaĵo. En la irigaciata regiono de Ningxia pli ol du milionoj da huj-oj kaj han-oj konstruis la akvokonservejon Qingtongxia (Ĉingtongŝja) kaj fosis kanalon longan je 1 100 kilometroj, kaj per tio plivastigis la irigaciatan areon ĝis 11.7 milionoj da muoj (1 hektaro = 15 muoj). En la irigaciata regiono Hetao de la Interna Mongolio oni disvastigis la metodon ŝpari akvon kaj kulturi

alterne agrikulturajn plantojn, kio faris la lokon fekunda kiel suda Ĉinio. En la lastaj dek jaroj duobligis la totala produktokvanto de greno, kaj la mua produktokvanto de rizo kaj tritiko jam atingis la avangardan nivelon de la lando kaj eĉ de la mondo. Kun la disvolviĝo en produktado de greno kaj kotonon, la popolo de la irigaciata regiono prosperigis ankaŭ fiŝbredadon kaj kulturadon de pomoj, kratagoj kaj aliaj plantoj.

En la provincoj Henan kaj Shandong funkcias granda sistemo de akvokonduka irigacio. La irigaciata areo atingis 31 milionojn da muoj, kaj la provincoj fariĝis la plej granda regiono de irigacio en Ĉinio. En la malsupra baseno de la rivero la plej frue konstruita kaj plej grandskala akvokonduka irigacia projekto estas la Kanalo de Popola Venko konstruita en 1952 en Xinxiang (Ŝinŝjang), Henan-provinco. Ĝia irigaciata areo atingis 0.88 milionon da muoj. La mua produktokvanto de greno estas pli ol 700 kilogramoj kaj tiu de kotonon — 90 kilogramoj. Ĉe la Flava Rivero ĉie videblas akvokondukaj konstruaĵoj kaj novaj domoj. Statistiko diras, ke tie estas 80 akvokluzoj, 35 akvokondukaĵoj kaj 68



Kanalo kondukanta akvon de la Flava Rivero



La Flava Rivero

akvopumpaj stacioj, kiuj kondukas dek miliardojn da kubmetroj da akvo el la Flava Rivero ĉiujare.

En la pasintaj dek jaroj la provinco Shandong suferis de trosekeco. Oni kondukis akvon el la Flava Rivero, ke stabile kreskis la produktokvanto de greno kaj kotono. En la lastaj 20 jaroj la profito de la akvokondukita sistemo en la provinco estis sep miliardoj da juanoj.

Akvokondukon faris ankaŭ la loĝantoj de la montregiono de la provincoj en la meza kaj supra basenoj de la Flava Rivero. En la ĉeriveraj provincoj Shaanxi (Ŝenŝji), Ningxia, Gansu kaj Qinghai mi vidis, ke multaj akvokondukaj konstruaĵoj servas kiel vivofonto de la montregiono, kiu suferis de trosekeco generacio post generacio. En la lastaj dekkelkaj jaroj, en Gansu, kie regis granda mizero en la pasinteco, ĉe la 486-kilometraj bordoj de la Flava Rivero oni faris pli ol 2 000 akvokondukajn konstruaĵojn kaj apud la zigzaga Qilian (Ĉjiljan)-montaro oni konstruis 2 000 grandajn kaj malgrandajn akvokonservejojn, kaj la areo de irigaciataj kampoj kreskis al 15 milionoj da muoj. Samtempe la

provinco konstruis 15 milionojn da muoj da ŝtupar-kampoj, kio plibonigis la produktajn kondiĉojn kaj garantias la fundamentan vivnivelon de la kamparanoj.

En Gansu-provinco la finiĝo de la elektra irigacia konstruaĵo de Sanjiaocheng (Sangĵaŭĉeng) en Yuzhong (Juĝong)-gubernio kaj funkciado de la duperioda elektra akvokondukita konstruaĵo de Jingtai (Ĝingtaj), kun plej longa distanco de akvopumpado en la lando, igas la Flavan Riveron feliĉigi la lokanojn. En 1982 la ŝtato enlistigis la agrikulturan konstruadon de la plej trosekeca kaj plej malriĉa regiono de Dingxi (Dingŝji) en centra Gansu kaj Xiji (Ŝjiĝji), Haiyuan (Hajĵuan) kaj Guyuan (Guj'uan) en Ningxia en ŝtatan planon. Ĉiujare la ŝtato investas al la loko 200 milionojn da juanoj, kio daŭros ĝis 2002. En la lastaj naŭ jaroj post la finkonstruiĝo de la irigacia stacio Guhai, per 11-ŝtupaj pumpiloj oni kondukis akvon de la Flava Rivero alten je 342 metroj kaj irigaciis 0.5 milionon da muoj da kampoj en suda Ningxia. Samtempe kun tio, estis solvita la problemo pri liverado de akvo al la loĝantoj ĉe la rivero. Dank' al tio, en la regiono Xiji,

Haiyuan kaj Guyuan aperis novaj vilaĝoj inter verdaĵoj kaj fekundaj kampoj.

La irigaciataj kampoj ĉe la Flava Rivero produktas grenon konsistigantan 70% de la totala produktokvanto de tiu regiono. Kaj krome, per akvokonduko oni garantias la akvoliveradon al la grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj kaj al la loĝantoj en la montregiono.

La Flava Rivero havas abundon da energio, kiuj okupas la duan lokon en Ĉinio. Laŭ la ekspluata plano, ĉe la ĉefa fluo de la Flava Rivero oni povas konstrui 38 hidroelektrajn. Nun oni jam konstruis Longyangxia (Longjangŝja), Liujiaxia (Liŭĵjaŝja), Qingtongxia, Sanmenxia (Sanmenŝja) kaj aliajn tri hidroelektrajn, kun jara produktokvanto de 17.6 miliardoj da kWh. Ĝis nun, ili produktis sume 180 miliardojn da kWh da elektro, kun totala produktovaloru de 12 miliardoj da juanoj, kiu egalas al trioblo de la tuta investo. Ĉe la Flava Rivero abundas ankaŭ karbo, nafto kaj naturgaso. Tial la Flava Rivero estas konata kiel riĉfonta rivero de Ĉinio. ■

Ĉinio kontraŭ koruptiĝo

de XIAO NAN

MALVERSACIO kaj koruptiĝo, kiel malvirta socia fenomeno, ekzistas ne nur hodiaŭ, ne sole en Ĉinio, tamen ilia malutilo al la ĉina socio ne estas ignorebla. La kaŭzo kuŝas en tio, ke la serioza koruptiĝo multe ĝenas la glatan iradon de la reformado, pordomalfermo kaj moderniga konstruado de Ĉinio kaj damaĝas la intimajn rilatojn inter la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo.

SERIOZECO DE KORUPTIĜO

Jam en la 50-aj jaroj la gvidantoj de la nova Ĉinio, kiu naskiĝis en 1949, donis grandan atenton al la batalo kontraŭ koruptiĝo en la ekonomia restariĝo. Tiam la ĉina kortumo kondamnis al morto la malversaciulojn Liu Qingshan kaj Zhang Zishan. Ili ambaŭ estis gvidaj kadroj de subprovinco kaj spertis la Popolan Liberigan Militon de Ĉinio. Ili laboris en urbo nur pli ol unu jaron kaj fariĝis malversaciuloj. Ilia ekzekutiĝo elektis multajn el nia oficistaro kaj pro tio la sociaj moroj refreŝiĝis. Post tio Ĉinio neniam ĉesigis la batalon kontraŭ koruptiĝo.

Nun Ĉinio troviĝas ĝuste en la periodo de intersanĝo de la

nova kaj malnova ekonomiaj sistemoj. La koncernaj leĝoj kaj sistemoj ankoraŭ ne perfektigis. Profitante la okazon, iuj faras kontraŭleĝajn agojn. Iuj ŝtatoficistoj, utiligante sian potencon, ĉasas siajn privatajn interesojn kiel monadorantoj. Estas homoj, kiuj subaĉetas potenctenantojn por siaj malpuraj celoj. Iu vicministro traktis landfaman kazon pri malversacio kaj koruptiĝo kaj nelonge post tio li mem koruptiĝis. Oni arestis iun koruptitan vicedstron de la buroo pri la batalo kontraŭ malversacio kaj koruptiĝo. Iu ŝtatoficisto en norda Ĉinio estis kondamnita al morto pro malversacio de granda monsumo, kaj daŭriganato de lia ofico ripetis lian krimon kaj malversaciis centojn da miloj da juanoj en malpli ol unu jaro.

Enketo montras, ke malversacio kaj koruptiĝo ofte okazas en fakoj de financo, materialoj, teradministrado kaj laŭkontrakta konstruado. Ofte okazas ankaŭ en iuj lokoj, ke kreditigantoj postulas pagon kaj terluigantoj faras ĉantaĝon.

Nun la seriozeco de koruptiĝo manifestiĝas ĉefe en la jenaj kvin flankoj: Gravaj kazoj pli kaj pli oftigas; pli kaj pli multiĝas la fenomenoj ĉasi siajn proprajn profitojn per potenco; pli kaj pli graviĝas la malŝparo de

publika mono kaj ĉasado de luksa vivo; sub la preteksto disvolvi la merkatan ekonomion, iuj energie produktas falsajn kaj malbonkvalitajn varojn kaj faras kontrabandon; kaj la loka protektismo kaŝas kaj ekscitas tiujn fiagojn. Ĉio ĉi forte malcontentigas la popolon. Pro tio la ĉinaj gvidantoj decidis fari landskalan batalon kontraŭ koruptiĝo.

KONTRAŭ KORUPTITAJ ŜTATOFICISTOJ

Ĉinoj kaj eksterlandanoj iam timis, ĉu la batalo kontraŭ koruptiĝo malhelpos la reformadon kaj pordomalfermon de Ĉinio.

La respondo estas nea. Kiam ili sciigos pri la seriozaj damaĝoj de la koruptiĝo, ili nature komprenos la profundan signifon de la ĉi-foja batalo. La faktoj pruvigas, ke la supre menciita batalo celas krei pli bonan enlandan medion por la reformado kaj pordomalfermo. La Dua Plena Sesio de la Komisiono por Inspektado de la Disciplinoj sub la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, okazigita aŭguste de 1993, montris: "La batalo kontraŭ koruptiĝo devas strikte ligiĝi kun efektiviĝo de gravaj reformadaj rimedoj kaj administraj kaj ekonomiaj decidoj. Tio signifas, ke oni devas kombini la batalon kun la ekonomia konstruado."

La ĉefaj atakatoj de la ĉi-foja batalo estas koruptitaj oficistoj de la partiaj kaj registaraj instancoj. La 5-an de oktobro 1993 la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Ŝtata Konsilantaro decidis fari ĉefe tri laborojn en la nuna tempo: La gvidantoj de la partiaj kaj registaraj instancoj devas esti modeloj de malkoruptiĝo; necesas malkaŝi gravajn kazojn kaj likvidi kelkajn malĝustajn tendencojn, kiuj forte malkontentigas

la popolon.

La decido tekstas, ke al la gvidaj oficistoj de la partiaj kaj registaraj instancoj estas malpermesate funkciigi entreprenon kaj sin okupi pri komercado; estas malpermesate al ili doni ian ajn privilegion al siaj edz(in)oj, gefiloj kaj aliaj parencoj en ilia komercado kaj funkciigo de entreprenoj; estas malpermesate al ili kumuli oficon en ekonomia ento, komerci per akcio, akcepti mondonacon kaj valorpaperon en oficaĵoj; estas malpermesate al ili membrigi al klubo paginte publikan monon kaj per publika mono partopreni luksan amuzadon.

Koncerne likvidon de la arbitra pagigo en la tuta lando, la decido montris, ke estas malpermesate por la ŝtataj administracioj kaj iliaj departementoj arbitre pagigi kontraŭ la senpaga servo, laŭvole pliigi la pagendan sumon kaj utiligante sian rajton fari devigan servon por granda enspezo. Ĉion ĉi oni devas likvidi de supre malsupren.

FARI LA BATALON TRA LA LANDO

Resuminte la antaŭajn spertojn en la batalo kontraŭ koruptiĝo, gvidaj instancoj de Ĉinio montris, ke en la 45 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ĉiuj sukcesoj en la batalo kontraŭ koruptiĝo dependis de la ĝustaj politikoj kaj rimedoj. Ĉi-foje oni ekzekutos grandajn malversaciulojn, kiaj Liu Qingshan kaj Zhang Zishan, kaj ankaŭ devas lerni la antaŭajn spertojn.

La Plej Alta Popola Prokurora Instanco de Ĉinio publikigis, ke ĝi jam akceptis pli ol 10 000 kazojn de malversacio kaj koruptiĝo, reakiris malversaciitajn objektojn kaj monon egalajn al 150 milionoj da juanoj, arestis 20 homojn, kiuj ĉiuj proprigis al si pli ol milionon da juanoj, prijuĝis 30 kazojn

de prifraŭdo de publika mono de pli ol 500 000 juanoj. En la lastaj jaroj la krimuloj de malversacio kaj koruptiĝo faris krimon samtempe en kelkaj regionoj kaj komplotis kun eksterlandanoj, tial la prokurora instanco planas fondi gvidan centron por detektivi gravajn kazojn faritajn samtempe en pluraj regionoj.

Lastatempe la Plej Alta Kortumo de Ĉinio kondamnis al morto tri krimulojn, kiuj senbride produktis kaj vendis falsajn kaj malbonkvalitajn varojn. Oni diris al mi, ke la kortumo punos ankaŭ iujn altrangajn krimulojn. Vicestro de la kortumo diris al mi, ke ĉiuj krimuloj devas esti kondamnitaj malgraŭ sia rango.

La ĉina registaro kaj la lokaj registaroj efektivas serion da metodoj kontraŭ koruptiĝo. He-

bei, Tianjin, Ŝanhajo, Kantono k.a. decidis kategorie likvidi diversajn tendencojn, ke gvidaj instancoj faras komercadon kaj gajnas profiton utiligante sian potencon, kaj fenomenojn, ke gvidaj ŝtatoficistoj ĉantaĝas, akceptas korupton kaj faras ĉion por mono.

Pekino atakas akaparon de publikaj domoj, ordigas la turisman merkaton kaj akcentas likvidon de la rekomenca servo far gvidaj instancoj kaj ĉiuj aliaj malbonaj tendencoj en la juĝaj kaj inspektaj instancoj kaj en la publikaj aferoj kaj ekonomiaj administracioj. Nun oni malkaŝis iujn gravajn krimulojn.

La batalo kontraŭ koruptiĝo estas unuanime subtenata de la popolo. Popolanoj aktive denuncas krimulojn, kio akcelas la disvolvigon de la batalo. ■

Monato

multaj kialoj por legi ĝin ĝuste nun!



Mendu provexempleron ĉe Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Disvolviĝo de la ĉina kardiokirurgio

LAŭ antaŭvido de la Monda Sana Organizo, en la jaro 2000 kormalsanoj fariĝos la plej danĝeraj por la homaro. Ĉinoj ne estas escepto, tial kormalsanoj prezentiĝis kiel aktuala problemo antaŭ la ĉinaj medicinaj laborantoj.


En 1956 Ĉinio komencis preventi kaj kuraci kardiovaskulajn malsanojn. Kvankam ĝi komencis entrepreni kardiokirurgion malpli frue ol aliaj landoj, tamen ĝi rapide progresis. Precipe en la lastaj jaroj, kun ofta medicina interŝanĝo kun aliaj landoj

kaj plimultiĝo de importitaj instalaĵoj, pli kaj pli multe da operaciitoj daŭre vivas. Dum la lastaj 30 jaroj la evoluintaj landoj kaj regionoj sukcesis savi 97% de la kormalsanuloj post kuracado. Beboj kaj novnaskitoj, kiuj suferis denaskajn kaj komplikajn kormalsanojn, rimarkinde resaniĝis post operacio kaj tiuj, kiuj ricevis operacion de anstataŭigo de valvoj, povas sane vivi. Ĉinio jam atingis kaj atingos la mondan avangardan nivelon en kuracado de denaskaj kormalsanoj kaj operacio de anstataŭigo de valvoj.

Ĉinio havas ĉiujare pli ol 60 000 bebojn suferantajn denaskajn kormalsanojn, ĉ. 2.5 milionojn da kardioreŭmatismuloj kaj ĉ. 100 000 pacientojn, kiuj bezonas operacion de anstataŭigo de valvoj, sed el la pli ol 400 hospitaloj, kiuj povas fari operacion je kormalsano, nur 60% povas konstante labori kaj fari nombron da operacioj. Tial nesufiĉeco de tiaj fakaj hospitaloj restas problemo urĝe solvenda.

Ĉinio certgrade atingis mondnivelajn kuracajn sukcesojn. Ekz., Xu Shaowu (Ŝju Ŝaŭu), kiu vivis jam 17 jarojn

S-ro Zhu Xiaodong ekzamenanta operaciitan pacienton





Kora operacio

post la operacio de anstataŭigo per biovalvoj, estas la unua tia operaciito kun plej longa vivdaŭro en Ĉinio kaj tio malofte videbla ankaŭ en la mondo. La 25-an de majo 1976 Zhu Xiaodong (Ĝu Ŝjaŭdong), nun direktoro de Fuwai-hospitalo de Pekino, per la unuageneracia perikardia valvo ellaborita de la hospitalo faris la operacion por Xu, kiu suferis kardioreŭmatismen kun aortaj stenozo kaj insuficienco. Post la operacio Xu daŭre laboras kiel riparisto en fabriko. Li edziĝis kaj havas infanon. Kelkfoje li faris eĉ pezan fizikan laboron. Lastatempe oni faris al li korpan ekzamenon kaj konstatis, ke lia koro bone funkcias. Estis normala la elektrokardiogramo kaj kontentigaj la supersona kaj X-radia ekzamenoj. Tio pruvis, ke la biovalvaj studoj kaj kliniko havas vastan perspektivon en Ĉinio.

Lastatempe Fuwai-hospitalo ellaboris sian triageneracian biovalvon. Diversaj biokemiaj

Tio multe faciligas al la kamparaj pacientoj, kiuj devas preni antikoagulanton dum la tuta vivo pro anstataŭigo per meĥanikaj valvoj.

Kiel faka ĉina hospitalo kontraŭ kormalsanoj, la Instituto de Kardiovaskulaj Malsanoj sub la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj faris en la pasintaj jaroj multajn elstarajn aferojn dank' al sia riĉa klinika sperto kaj perfekta kuracistaro. En 1992 Fuwai-hospitalo faris 2 425 koraĵajn operaciojn, kvarone kiom tiuj de la tuta lando. La nombro de ĝiaj operacioj de anstataŭigo de valvoj superis 10 000, kiuj plejparte estis sukcesaj. Ĝia nivelo de kardiokirurgia tekniko por kuraci tetralogion de denaska kormalsano kaj denaskan komplikitan koranomalion proksimiĝis al tiu de la mondo. Nur 4% de ĝiaj operaciitoj mortis. Dank' al ĝia perfekta kunligo de kardiovaskuloj, pli kaj pli multaj pacientoj vizitis ĝiajn kuracistojn. Sukcesis ankaŭ ĝiaj diver-

kaj fizikaj ekzamenoj montris, ke tia biovalvo havas duoblan kontraŭlacan intenson kompare kun la unuakaj duageneraciaj. Ĝis nun jam 5 pacientoj ricevis operacion de anstataŭigo per tia biovalvo. Se la klinika efiko atingas aŭ preskaŭ atingas la eksperimentan nivelon, tia biovalvo povas esti ĝenerale uzata.

saj malfacilegaj operacioj — operacioj de plurfoja anstataŭigo per pluraj valvoj, operacioj je intertavola aneŭrismo, Marfana sindromo kaj denaska komplika anomalia, kiel aorta delokiĝo, unuobleco de kora ventriklo, duobla aperturo de la dekstra kora ventriklo, pulmoarteria atrezio, trikuspida atrezio, grava tetralogio kaj kompleta nesufiĉeco de endokardia valvo.

Dum la 10 jaroj post sia fondiĝo la Ĉina Kardiovaskula Teknika Centro en Pekino kulturis ĉefe kardiokirurgojn por la kunlaboraj hospitaloj kaj organizis operaciajn grupojn por kuraci kormalsanulojn en la hospitaloj kune kun tiuj kardiokirurgoj per nova tekniko. En la kunlaboro nun partoprenis 57 hospitaloj de 24 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj. Oni starigis 8 filiojn en Nanchang, Guangxi (Gŭangŝji), Hunan, Hubei, Yinchuan, Shashi, Qingdao (Ĉingdaŭ) kaj Jinan (Ĝjinan). La disvastigo kaj apliko de kardiokirurgio ne nur solvis la malfacilon de multeco de pacientoj kaj malmulteco de hospitaloj, sed ankaŭ akcelis ĝian progreson en Ĉinio. Oni povas antaŭvidi, ke estonte kora operacio fariĝos pli kaj pli malfacila, ĉar fakaj hospitaloj akceptos ĉefe malfacile kuraceblajn malsanulojn kaj la operacio estos pli riska. Por levi la kuracan efikon kaj plibonigi la modernan administradon de hospitaloj, la rilataj instancoj organizis fakulojn por difini normojn de kormalsanoj.

Novembre de 1993 okazis en Fuwai-hospitalo la 2-a Internacia Simpozio pri Koronaria Kormalsano kaj Hipertensio. Tio montras, ke Ĉinio jam enviciĝis inter la avangardaj landoj en kardiokirurgio. En la simpozio ĉinaj kaj alilandaj fakuloj raportis pri siaj novaj sukcesoj en tiu kampo. ■

ESP-NOVAĴOJ

Ni bonvenigas Esperantajn artikolojn, Esp-novaĵojn kaj fotojn de ĉiujn Esperanta organizo kaj individuo. Bonvolu sendi la kontribuojn al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Pekino, 100037, Ĉinio.

La Red.

● La 11-an de julio, 1993, la Xiqu-a Poŝtmarka Kompanio de Pekino uzis oficialan Esperantan poŝt-stampon por memori la unuan datrevenon de la morto de s-ino



Esperanta poŝtstampo por la unua datreveno de la morto de Deng Yingchao

Deng Yingchao (1904-02-04 — 1992-07-11), edzino de s-ro Zhou Enlai, la forpasinta ĉefministro de la Ĉina Popola Respubliko. S-ino Deng Yingchao lernis Esperanton en 1913. La Esperantan poŝt-stampon desegnis Xie Shaoxiang kaj Tan Ailing.

● La 30-an de aprilo 1993 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis serion da specialaj poŝtmarkoj pri vejĉio kaj samtage la Poŝtmarka Kompanio de Haikou,

Hainan-provinco uzis Han-lingvan kaj Esperantan poŝtstampon, kies projektinto estas s-ro Zhang Linrui.

● Por pli bone disvastigi Esperanton inter diverslandaj geknaboj, japana esperantisto s-ro Hashiguchi Shigejuki planis eldoni poŝan libreton de Esperanta konversacio. Ĝi havos ĉirkaŭ 100 paĝojn totale kun fundamenta konversacio Esperanta, angla, japana, han-a k.a. kaj ilia Esperanta prononco. S-ro Hashiguchi Shigejuki nun serĉas helpanton kaj kunlaboranton el diversaj landoj. Adr: S-ro Hashiguchi Shigejuki 840 Saga-shi Honjhoo-machi, Honjhoo 571, NTT 243 Japanio.

● Montejo, la tri-monata gazeto de Nepala Esperanto-Asocio, festis sian 1-an datrevenon la 11-an de septembro 1993. Pli ol 30 ĉeestantoj aŭskultis raporton de la ĉefredaktoro kaj diskutis pri la frontataj malfaciloj.

● La Belartaj Konkursoj de UEA havis en 1993 unu el siaj plej bonaj rikoltoj de la lastaj jaroj. Plej elstare kontribuis junaj iberiaj aŭtoroj, kiuj konkeris ĉiujn premiojn de poezio kaj prozo. En 1994 la konkursoj ne plu invitas fotojn kaj des pli forta estas la invito al eseistoj. Ĉiuj kontribuoj alvenu plej laste la 31-an de marto 1994. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1994. Ĉion

oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

● Lernejoj por la Nova Kulturo ne-profitigaj estas loko por lerni arton vivi. La unua lernejo komenciĝis en marto 1991 en Argentino, kun 6 infanoj 3-jaraj. Baldaŭ aperos lernejoj ankaŭ en Meksikio. En marto 1994 D-ro Ruben Feldman Gonzalez vizitos Peruon kun la intenco fondi novan lernejon tie. 5 geinstruistoj por Esperanto estas bezonataj. Sendu vivresumon al: Ruben Feldman Gonzalez, P.O.Box 230662, Anchorage, Alaska-99523, Usono.

● Scienco-Tekniko-Socio (STS) okazigis la 12-an STS-Simpozion la 5-an de junio, 1993, ĉe Tokia Universitato, la temo estas: "Junulara forigo for de scienco kaj tekniko". Inter la 23-a kaj la 25-a de julio 1993 okazis la 3-a Somera STS-Lernejo apud la monto Fuji. Partoprenis 32 membroj. Oni pritraktis la temojn: manĝaĵ-aldonaĵoj, sociaj kostoj de aŭtoj, laborprocezo en fabriko, bioetiko, scienca politiko ktp.

● La 1-a Interreligia Seminario Esperantista organizata de Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj okazos inter la 31-a de marto kaj la 4-a de aprilo 1994 en la urbo Tabor de Ĉeĥio. La temo de la seminario estas: "Neniu estonto sen interreligia paco". Informilo kaj aliĝilo ĉe: B. Westhoff, p.k. 500133, 60391 Frankfurt, Germanio.

● La Internacia Fervoja Kongreso okazos en la pitoreska apud-danuba urbo Krems de Aŭstrio en la 13-a — la 20-a de majo 1994.

Membroj de la Organiza Komitato de la 46-a Internacia Fervoja Kongreso. La unua de dekstre en la fronto estas s-ro Leopold Patek, peranto de EPC en Aŭstrio.

Redaktoroj de la gazeto "Montejo"



Imitinda ekzemplo

de LAŬLUM

TIBOR SEKELJ: *GAMBO RAFIKI* — *La Karavano de Amikeco tra Afriko*. Kolekto de rakontoj originale verkitaj en Esperanto pri esplorvojaĝo tra orienta Afriko. Eldonita de Edistudio, 1991. Formato: 14 cm. × 22 cm. 176 p. plus 24 p. de ilustraj fotoj nigro-blankaj. Prezo nemontrita.

Nia karmemora akademiano kaj eksprezidanto de EVA Tibor Sekelj (1912-1988), kiu volis fosi truon en sia ĝardeno estante infaneto por atingi Amerikon, vojaĝis tra ĉiuj kvin kontinentoj kaj vizitis ĉ. 90 landojn, esplorante pri la lokoj kaj loĝantoj kiel sciencisto geografia, antropologia, muzeologia kaj folkloro kun intereso de ĵurnalisto, verkisto kaj lingvisto. Li verkis pli ol 20 librojn pri siaj travivaĵoj fizikaj kaj spiritaj. En 1962, li organizis ekspedicion el 8 personoj por esplorvojaĝi tra orienta Afriko dum unu jaro, kaj rezulte de tiu vojaĝo li verkis sian kolekton de 52 rakontoj titolitan per “Ĝambo Rafiki”. La vorto “ĝambo rafiki” signifas “bonan tagon, amiko”. Tibor Sekelj uzis ilin por titoli sian verkon, ĉar ĝi temas pri klopodo plifortigi la amikecon inter la popoloj de Afriko kaj tiuj de la ceteraj partoj de la mondo.

Legantoj, kiuj ĝuis jam la 30 mirrakontojn en “Mondo de travivaĵoj” de la sama aŭtoro, eble demandus: “Ĉu la rakontoj en tiu ĉi kolekto estas tiel interesaj kiel ‘Renkonto kun kanibaloj’ en ‘Mondo de travivaĵoj’?” Mi povus respondi senhezite per jes. Mi ne posedas la lingvan sorĉon por konigi al vi ĉion interesan en la nova libro per malmultaj vortoj. Mi povas tamen certigi vin, ke ili estas ne nur taŭgaj legaĵoj por mortigi vian enuon dum longa vojaĝo, sed ankaŭ povas riĉigi vian trezorejon de scioj, konigante al vi popolojn kaj landojn de orienta Afriko per siaj vivecaj priskriboj pri lang-eligaj lokoj, mirindaj moroj, ekzotikaj kutimoj, mizera monopolo, fataloj kaj bataloj ktp. Jen kelkaj el la titoloj de la rakontoj, kiuj mem povas iom riveli al vi la sukoplenajn rakontojn: Sabla ŝtormo en Gorem; La plej granda spek-

taklo de la mondo; Urbo de kolomboj (por viando kaj sterko); Tra la soifa savano; Viva legendo sur lago Tano; Viva legendo pri la reĝino Ŝeba; La rido de hieno; Tre blua estas la Ruĝa Maro; Etio- pio junigas vin; Ritmo de Afriko; Kiom valoras homa vivo; Hotelo sur arboj; Blankaj farmistoj en danĝero; Leonoj kaj elefantoj ĉe la piedo de Kili- manĝaro k.a.

Se vi jam legis la novelon “Kolektanto de ĉielar-koj” de T. Sekelj en la populara lernolibro “Paŝoj al plena posedo” de William Auld, vi samopinius kun mi, ke Tibor Sekelj estas naturdotita per talento de rakontisto. Ankaŭ “Ĝambo Rafiki” karakteriziĝas per lia stilo de klareco, viveco, freŝeco, optimismo kaj spriteco. Liaj figurplenaj lingvaĵoj kredeble donos helpon al la lernantoj en kursoj por progresantoj.

Kiel poligloto, kiu lertas en pli ol dek lingvoj, Tibor Sekelj spicis sian lingvon per multaj freŝaj esprimoj pruntitaj de aliaj lingvoj, kiel ekz. *minuskla* varo (t.e. bagatelaĵoj), *frapi ies atendon* (= surprizi iun), *viglaj* (vivecaj) koloroj, ktp. Tamen eble ankaŭ pro sia poligloteco li misuzis “kontroli” en la senĉo de “regi”, ekz. sur p. 103: “Li... kontrolis la landon”; sur p. 151, li uzis “koloraj glasperloj” anstataŭ “koloraj vitrobidoj”, kaj plurfoje atribuis al la verbo *ŝargi* la senĉon “enmeti”, kiun ĝi ne havas laŭ PIV. Li aldonis superfluan -ig- al transitivaj verboj, kiel ekz. en la vortoj *terurigi*, *koncentrigi*, *konfuzigi*, *lokigi*, *ekscitigi*. Precipe rimarkinda estas la misuzo de “teruriga”, kiun mi rimarkis ĉe pluraj verkistoj. Laŭ PIV “teruri” signifas “inspiri al iu egan timon”. Tibor Sekelj foje kaj refoje uzis “labori” kiel transitivan verbon: laboras la teron, laborebla grundo. Ankaŭ ĉe alia verkisto mi trovis tian uzon. Tio signifas larĝigon de la senĉo de labori, ne nur transitivigon.

Ĉiujare sufiĉe granda nombro da esperantistoj vojaĝas en la tuta mondo kaj por partopreni la

(Daŭrigo sur p. 15)



Edistudio

Misiro en poezian ĝardenon

de SHI CHENGTAI

MIA panjo, instruistino pri historio, kiu oferis sian vivon al la edukada afero, donis al mi la komencan edukadon per poemoj. Kiam mi estis lerneĵano, mi legis librojn, inter kiuj poemoj de la ĉina poeto Ai Qing tre interesis min, kaj dum la 50-aj jaroj poemoj de la ĉina poeto Guo Xiaochuan kantantaj pri la bela futuro de la patrujo pli ravis min, eĉ mi mem sentis tikladon en la mano kaj verŝis naivajn frazojn... Mi aĉetis poemaron tradukitan de fama ĉina poeto Guo Moruo (Guo Moĵūo) el la angla, en kiu mi trovis poemojn de Goethe, Shelly, Majakovskij k.a. Panjo diris, ke mi diligente kaj multe legu, ĉar la libroj malfermos antaŭ mi la novan mondon. Ekde tiam la poezio akompanis mian junecon.

En 1958 mi, abituriento, estis envolvita en la politikan movadon kaj min forlasis poezieco. Dum la anima turmentado mi pli multe turnis min al poemoj de la ĉina klasika poezio kaj legis poemojn de Li Bai (701-762), Du Fu (712-770), Li He (790-816), Su Shi (1037-1101) kaj Li Qingzhao (1084-ĉ.1151), en kies voĉoj pri la homaj sufero kaj aspiro al idealo pri la homara harmonio mi trovis resonancon en la animo. Dum la dekjara Kultura Revolucio mi trafolumis kelkajn ekzemplerojn de El Popola Ĉinio por ne forgesi nian karan lingvon, krome, mi ankaŭ tre malfacile trovis aliajn por legi. Iuj poemoj sur ties paĝoj ofte donis al mi grandan ĝuon. Mi ekstudis la


Esperantan metrikon laŭ artikoleto de Venlo Fon en la elementa kurso de Esperanto, laŭ ties klarigo mi ankaŭ fingrume kalkulis silabojn en versoj, tamen la klarigo en la artikoleto ja estis tre simpla, kaj ĉe miaj manoj legaĵoj en Esperanto estis tro malmultaj, mi ofte sentis mian fingruman legadon ne kontentiga...

Jam en la 70-aj jaroj mi ricevis mimeografan libron, nome la Esperantan Metrikon, la nomon de aŭtoro Guozhu mi legis en iu mimeografa revueto en Esperanto kaj la ĉina lingvo. Kiel ĝoja mi estis! Mi trovis kontentigan klarigon pri Esperanta metriko kaj bonajn poemojn, kiujn la aŭtoro prenis kiel ekzemplojn. Poste mi ricevis la mimeografan libreton El Ĉina Poezio kompilitan de Danchen, en kiu la kompilinto kolektis poemojn en EPĈ, tradukitajn de S. J. Zee kaj Laŭlum el la ĉina klasika poezio, kaj sep poemojn de Li Bai, tradukitajn de Kalocsay. Mi miris antaŭ tiuj poemoj, ke la tradukintoj tiel lerte surmetis belan veston de Esperanto al tiuj poemoj, la ĉinaj antikvaj! La Esperanta poezio donacis al mi faskon da espora lumo en la tiama sombro. Eĉ mi denove ne eltenis tikladon en la mano, kaŝe ekzercis min per versado en Esperanto, hazarde kontentiga verso alportis delicon al mi en izolo...

Post la faligo de la Kvarpersona Bando oni diris, ke Ĉinio akiris la duan liberigon, kaj la ĉina Espromovado renkontis la printempon. Mi vizitis s-anojn Tikos, Zensto, Armand Su k.a., kies instigoj

spronis mian entuziasmon en Espromovado, kaj mi povis pli multe legi belajn poemojn en la Esperanta Antologio, Ora Duopo, Izolo, Norda Naturo ktp. Ŝajnis al mi, ke Muzoj, kiuj forlasis min dum mia juneco, denove favoras min, kaj mi, preninte plumon, poste sur tajpilo, verŝis, pliparte pri la verda temo, eĉ en la 80-aj jaroj iuj pecoj havis honoron aperi sur paĝoj de revuoj en Esperanto, tie ĉi mi devas mencii kelkajn nomojn pro ilia toleremo al miaj nematuraj versaĵoj aŭ verkaĵoj, ekz. W.Auld, Aldo de Giorgi, Hayasi Ken, Daniel Luez k.a... por esprimi mian koran dankon!

Mi ŝatas poemojn de Li He en Tang-dinastio, kiun ĉinoj nomas la poezia fantomo, ties poezio estas tre malfacile komprenebla eĉ por ni, ĉinaj legantoj. Ĉu oni povas esperantigi liajn poemojn? Nu, lasu min provi, mi diris al mi. En 1984 mi aŭdace komencis esperantigi Li He, eĉ mi sendis pecojn al W. Auld, la granda figuro de la hodiaŭa verda Parnaso en mia koro, kun peto, ke li ekzamenu mian tradukon kaj donu kritikon. Anstataŭ kritiko aŭ korektado, li aperigis miajn tradukaĵojn en la beletra revuo FONTO, tio kuraĝigis min. Pli ĝojinde, baldaŭ mi ricevis leteron de Kris Long el Anglujo. Li skribis al mi, ke ankaŭ li preferas la ĉinan klasikan poezion, eĉ por legi Du Fu li lernis la ĉinan lingvon (ŝajnas al mi, ke li ellernis legi la klasikan ĉinan lingvon kaj volonte kontrolas miajn tradukaĵojn). Poste mi esperantigis poemojn de Li Qingzhao kaj Li Shan-



La aŭtoro antaŭ la memorhalo de poetino Li Qingzhao

gyin (ĉ.813-ĉ.858). Miaj manuskriptoj unu post alia sendiĝis al Kris Long. Post lia zorga kontrolo mi refoje reviziis kaj perfektigis ilin laŭ lia admono, kiel versis Kalocsay:

*Vi devas ĝin cizeli kaj emajli,
kaj, se necese kvindekfoje fajli,
ĝis penso, form' ekstera kaj interna
fandiĝos en mistera nupt'
eterna.*

Dum la tradukado mi renkontis multajn fuortojn konstruitajn de apartaĵoj en la ĉina lingvo kaj ĉina klasika poezio. Precipe la ĉinaj poetoj preferis uzi epizodojn aŭ anekdotojn en sia poemo por aludi sian ideon aŭ penson. Tiukaze mi nur prenis liberan tradukon por traduki sencon, sed ne vortojn de la originalo. Alie, mi opinias, ke mi devas traduki poemojn de Li Bai, Li He k.a. per severa metriko forme, ĉar la originaloj ja estas metriko-severaj. Kompreneble oni devas serĉi esprimon plenan de imag-senco.

La tradukaĵoj de pli ol 110 poemoj de Li Bai restas ĉe la manoj de Auld. Ĉu iu eldonejo interesigas pri ili? Mi ne scias.

Li Qingzhao estis fama poetino en Song-dinastio. Ŝi versis per la fiksa formo, t.e. en unu poemo troviĝas longaj kaj mallongaj versoj kun severaj ritmo kaj rimo por kongrui kun melodio de muziko. Kiam mi tradukis Li Qingzhao, mi ankaŭ atentis tian trajton kaj konscie tradukis ilin en versojn kun malsamaj silaboj, eĉ mi severe tradukis unu silabon/ideogramon en la ĉina per unu piedo (du silaboj) en Esperanton. Mi ne pretendas, ke mi serĉas la ĝustan vojon por solvi la problemon, sed mi deziras doni al posteuloj mian provadon. Dum mi tradukis Li Qingzhao, mi ankaŭ konsideris, kial mi ne prenas la fiksoformojn de la ĉina poezio, kiam mi versis. Japanaj poetoj, ekz. Miyamoto Masao, Ueyama Masao kaj Masayuki Kuroda verkis laŭ formo de hajko kaj tankao, kaj Miyamoto iam elmetis "Invit' al Japanesko". Sub ilia influado iuj aŭtoroj el Okcidento jam uzis tiajn

Poste mi kaj Guozhu kunlabore elĉinigis poemojn de Li Bai, la plej granda poeto en la ĉina historio (ankaŭ unu en la monda historio), tian laboron fervore instigis W. Auld, kiu mem esperantigis liajn 11 poemojn el la angla versio. formojn en la verda Parnaso, ekz. Kalocsay, Dresen, Urban k.a. Do, ni, ĉinaj samideanoj, devas kontribui al la verda Parnaso. Mi proponis versi la Ĉineskon kaj ankaŭ mi mem prove versis laŭ melodio Tiaoxiaoling. Guozhu kaj Lu Jixin (Lu Ĝjiŝin) fervore eĥis min kaj ili oferis al legantoj fruktoplennan laboron. Tiaoxiaoling bezonas specifan aranton metrike, t.e., la ripetaj du vortoj de du silaboj en la kvina verso devas esti palindromoj de la lasta vorto en la kvara verso, ekz.: mono — nomo; rimi — miri; mora — arom'. Tio estas malfacile solvebla en la Esperanta poezio. Sed, ni ŝajne gajnis la komencan sukceson. Ni kredas, ke ankaŭ ni povas inviti samideanojn al Ĉinesko.

En julio de 1990 aperis beletra revueto Esperanta PENSEO, kiun mi redaktas, kaj kiun distribuas s-ano Lin Liyuan sub subvencio de juna mecenato s-ro Evin, celante diskonigon de la brila ĉina kulturo al la mondo, vigligon de beletro en Esperanto kaj bakadon de novicoj en la Esperanta verkado. Kvankam ĝi estas tre modesta, tamen ĝi akiris fervoran subtenadon de la tuta verda mondo. En PENSEO mi metis la rubrikon Paĝo de Ĉinesko, en kiu Guozhu, Lu Jixin, Li Weilun k.a. publikigis siajn verkojn, eĉ mia amiko Kris Long kaj s-ino Meva Maren kontribuis siajn poemojn laŭ Tiaoxiaoling. La juna s-ano Mao Zifu, kriplulo, debutis en la revueto.

Mi kredas, ke la interfluado de kulturoj sur la mondo akiros pli pompan sukceson per Esp-ponto. Tio ankaŭ spronos la disvastigon de la Esp-movado. Por la celo kaj idealo de Zamenhof ni ĉinaj samideanoj devas kontribui pli multe. ■

(Daŭrigo de p. 13)

tradician UK, ili estas volontaj elspezi milionojn da usonaj dolaroj. La vojaĝemo certe estas pravigebla kaj aprobenda, ĉar tio konformas al la celo de Esperanto — interkomprenigi kaj interamikigi la popolojn. Se centono el la vojaĝemuloj imitus la ekzemplon de Tibor Sekelj, farante esplorojn pri la

landoj kaj popoloj dum siaj vojaĝoj, kaj verkus librojn pri siaj travivaĵoj, kaj se dekonono de la elspezo por vojaĝoj estus investita en eldonadon de Esperantaj verkoj kaj uzata por aĉeti librojn en la internacia lingvo, tio kredeble helpus la prosperigon de la Esperanta kulturo ĝenerale kaj la eldonadon precipe. Tibor Sekelj donis ekzemplon imitindan. Ni sekvu lin!

Esperanto-movado en Xinjiang



La aŭtoroj Guan Fengsheng (dekstre) kaj Sun Aijun (la dua de dekstre) kaj s-ro Zhang Zhong (maldekstre)

EN la 30-aj jaroj oni propagandis Esperanton en Xinjiang (Ŝingĝang) de nordokcidenta Ĉinio, sed la tiea E-movado vigliĝis nur post la komenciĝo de la 80-aj jaroj. Tiam centoj da diversnaciaj junuloj kaj Esperantaj aktivuloj tie lernis en Esperantaj lernejoj aŭ kursoj. Kelkajn jarojn poste, aperis en Xinjiang kvalifikitaj e-istoj kaj estis starigitaj Esperantaj organizoj en la Changji(-Ĉangĝji)-a Huj-nacia Aŭtonoma Subregiono, Aksu-regiono kaj la Xinjiang-a Universitato. En decembro 1984, la Unua Esperantista Kongreso de Xinjiang okazis en Urumĉi kaj fondiĝis la Esperanto-Asocio de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono (EAX).

La fondiĝo de EAX akcelis la disvolviĝon de Esperantomovado en Xinjiang kaj plioftigis la kontakton kun alilokaj Esperantaj organizoj. En la periodo de la fondiĝo ĝis la partopreno de reprezentantoj de EAX en la Kvina Pacifika Kongreso de Esperanto, okazigita en Qingdao (Ĉingdaŭ) en aŭgusto 1992, EAX ne nur okazigis E-kurson multfoje, partoprenis en- kaj eksterlandajn E-kongresojn kaj organizis ekspozicion de poŝtmarkoj, Esperantaj libroj kaj gazetoj kaj fotoj pri E-movado, sed ankaŭ faris ekzamenon por membriĝo al ĈEL kaj UEA kaj oka-

zigis Esperantan ekzamenon por la plialtiĝo de profesia rango. Laŭ nekompleta statistiko, ĝis la fino de 1992 la nombro de lernantoj de Esperanto en la regiono superis 7 000 kaj sep esperantistoj de la ujugura, kazaha, manĉura kaj hana nacioj trapasis la internacian Esperantan ekzamenon de elementa kaj meza niveloj.

La disvolviĝo de E-movado bezonas monon. Iam EAX preskaŭ paraliziĝis pro manko de mono.

Por solvi la problemon esperantistoj en Xinjiang faris ĉion eblan por kolekti monon. EAX decidis starigi sian komercan entreprenon. Konsidere al ekonomia malforteco de esperantistoj kaj Esperanta organizo, EAX mobilizis siajn membrojn por financi ĝin kaj akceptis monhelpon de Esperantaj adeptoj por la sama celo. En julio 1993 fondiĝis la Verda Kompanio de EAX. Samtempe EAX ekfunkciigis la Verdstelan Vendejon, la Xinjiang-an Esperantan Fakon de la Ĉina Internacia Turisma Servo kaj Trejnan Centron de la Verda Kompanio.

La Verda Kompanio estas en malgranda ĉambro. Sur muro pendas la tabuloj kun la surskribo Esperanto-Asocio de Xinjiang kaj Verda Kompanio. Ĉi tiu ĉambro servas ne nur kiel la in-formejo de la Verda Kompanio, sed ankaŭ kiel la oficejo de

EAX.

S-ro Zhang Zhong (Ĝang Ĝong), ĝenerala sekretario de EAX, diris, ke antaŭe la konsilianoj ofte monofaris por la aktivado de EAX. Dank' al la Verda Kompanio, EAX havas monon por eldoni revuon, gastigi alilandajn esperantistojn ktp.

Helpe de la internacieco de Esperanto, la Verda Kompanio klopodas altigi la profiton de la entrepreno. Kaj plie, la Verda Kompanio planas eldoni lernolibrojn kaj turismajn broŝurojn en Esperanto kaj la nacia lingvo.

En Xinjiang ankaŭ multaj aliaj esperantistoj dediĉas sin por Esperanto. S-ro Ŝadman Aĥanov, ujugura instruisto de universitato, foje kaj refoje gvidis E-kurson dum multaj jaroj. La esperantistaj geedzoj Song Bin kaj Gu Xiaoru (Gu Ŝjaŭju) memvole akceptis japanan esperantistinon fraŭlino Takei Eri, kiu vizitis Urumĉi. Ŝi emocie diris, ke ŝi ne atendis, ke la E-movado en Xinjiang tiel viglas, kaj ke ŝi nepre sciigos ĉion ĉi al japanaj esperantistoj. S-ro Liu Xiaozhe (Liŭ Ŝjaŭĝe) fervore korespondis kun alilandaj esperantistoj kaj partoprenis en redaktado de E-revuo.

La esperantistoj en Xinjiang senlace laboras, por ke pli kaj pli multe da homoj konu Esperanton kaj bone sciu, ke Esperanto estas utila komunikilo. ■

EN mia memoro estas malgranda stacio, ĉe kiu trajnoj haltas nur unu minuton.

Estis vespero, kiam la trajno haltis. Al la trajnfenestroj tuj proksimiĝis aroj da geknaboj, kun diversformaj korboj sub la brakoj. En la korboj estis kokovoj, jujuboj kaj aliaj manĝaĵoj. La pasaĝeroj aĉetis la manĝaĵojn kaj pagis tra la fenestroj. Tuj knabinoj interŝanĝis ovojn kontraŭ ronda speguleto aŭ kaptuko.

Malantaŭ la geknaboj staris knabino. Ŝi estis 15-16-jara, en malhelkolora ĉemizo, kun longa harplektaĵo antaŭ la brusto. Ŝi ne kunportis korbon, sed tenis en la mano malgrandan paketon. Ŝi paŝis al mi. La lampo en la vagono lumigis ŝian belan vizaĝon, kaj ŝanĝbrilis ŝiaj okuloj.

“Onklo, mi deziras vortaron. Vi certe havas tion, helpu min, onklo.” mallaŭte kaj timeme diris la knabino.

Vortaro? mi ne atendis, ke knabino en dezerta montvilaĝo bezonas vortaron! Rigardante ŝiajn okulojn kun espero, mi sentis neforpuŝeblan devon helpi ŝin.

“Jes, vortaron mi havas, sed mi ne kunportas.”

Tuj malaperis la esperplena mieno. Tiam la trajno ekmoviĝis.

“Momenton,” mi kriis. “Mi po-

POR KOMENCANTOJ

Malgranda stacio



vas aĉeti vortaron por vi.”

“Ĉu vere?” ŝi revigliĝis kaj mi vidis, ke ŝiaj okuloj jam pleniĝis je larmoj. La trajno moviĝis pli rapide. Ŝi ekkuris sur la kajo kaj jetis malgrandan paketon en la fenestron.

Antaŭ ol mi demandis ŝian nomon, ŝi jam malaperis en mallumo. Mi residiĝis kaj disvolvis la paketon. En blanka mantuko kun blua rando kaj flava brodaĵo estis

jada braceleto. Mi pensis, ke la jada braceleto estas trezoro de la knabino. Kiam ŝi jetis la paketon al mi, ŝi donis al mi ankaŭ ŝiajn esperon kaj konfidon.

Reveninte, mi tuj aĉetis por la knabino plej freŝdatan vortaron kaj kelkajn librojn. Mi metis ilin kaj la braceleton en tirkeston kaj atendis refojan vojaĝon. Sed kiam mi refoje vojaĝis tie, jam pasis tri jaroj.

Vespere la trajno haltis ĉe la sama stacio. Mi elŝovis la kapon el la fenestro kaj ekserĉis la knabinon kun longa harplektaĵo. Mi volis voki ŝin, sed mi ne sciis ŝian nomon. Mi tutforte svingis la manon al ŝi.

Ŝi kuris al mi. Mi donis al ŝi la vortaron kaj librojn. Sed ŝi mire diris: “Onklo, kio tio estas?”

“Ĉu vi ne petis de mi vortaron antaŭ tri jaroj?” mi elmontris al ŝi la mantukon kaj braceleton.

Vidante la braceleton, ŝi komprenis: “Tio estas de mia pliĝa fratino! Nia patrino donis po unu al ni! Mia fratino promesis aĉeti vortaron por mi.”

“Kie estas via fratino?”

“Ŝi jam edziniĝis.”

Mi englutis la pluan demandon, ĉar la trajno ekmoviĝis. ■

Horaro de ĉiutaga Esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

(ekde novembro 1993)

Universala Tempo	Regiono	Ondoj (m)	kHz
20.00-20.30	Eŭropo	40,16	7470
		40,51	7405
		30,11	9965
22.30-23.00	Latin-Ameriko	31,65	9480
		26,05	11515
11.00-11.30	Japanio, Koreio	43,13	6955
		31,65	9480
13.00-13.30	Sudorienta Azio	25,75	11650
		25,34	11340

Adreso: Esperanto-Sekcio de Ĉina Radio Internacia, Fuxingmenwai Dajie, CN-100866 Beijing, Ĉinio

Horaro de ĉiutaga Esperanta disaŭdigo de Pola Radio

(ekde oktobro 1993)

Universala Tempo	Regiono	ondoj (m)	kHz
14.30-14.55	Eŭropo	25,39	11815
		31,45	9540
		31,50	9525
		48,90	6135
21.30-21.55	Eŭropo	41,99	7145
		48,90	6135
		50,04	5995
		200,00	1503

Adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, P.O. Box 46, Pollando

Universala Tempo antaŭe nomiĝis Grenviĉa Meza Tempo. Detalaj informoj pri ĉiutagaj elsendoj haveblas ĉe ambaŭ radiostacioj. Bonan aŭdeblecon!

Reproduktaĵoj de la Imperiestra Palaco

Teksto kaj fotoj de **CHENG MINGGUI**

Qianqing(Ĉjanĉing)-halo en la Imperiestra Palaco de Pekino estis loko, kie imperiestroj de Ming-kaj Qing-dinastioj (1368-1911) traktis ŝtatajn aferojn. Interne de la halo staras majesta trono kaj kvin-klapa ekrano malantaŭ ĝi, kiuj estis delikate faritaj en la jaroj 1662-1723. Estas skulptitaj diverspozaj drakoj sur la trono kaj ekrano, tre valoraj por historia studo kaj arto. La du mebloj ĉi tie montrataj estas imite faritaj en multaj jaroj sub la direktado de s-ino Chen Lihua, direktoro de la mebla kompanio Fuhua de Pekino. La reproduktaĵoj, faritaj el pterokarpo kaj palisandro, karakteriziĝas per reliefaj figuroj, klaraj linioj kaj racia strukturo. Ĉio ĉi montras, ke la reproduktitaj trono kaj ekrano estas same senkostaj kiel la antikvaj.

S-ino Chen Lihua direktas faradon de trono.






Ekrano imite farita

Trono imite farita



Drakoj sur la trono



Nantong prosperiĝas danke la havenon

Teksto de **JI PING**

Fotoj de **MO BINGCHUN**

NANTONG, fekunda regiono kun areo de 8 000 kvadrataj kilometroj, sterniĝas norde de la enfluejo de Yangzi-rivero. Oriente ĝi najbaras al la Flava Maro kaj estas la plej juna "infano" de la patrino rivero Yangzi. Antaŭ 2 000 jaroj tie estis sabla riverbordo, kaj nun tie jam aperis granda urbo kun 7.8 milionoj da loĝantoj. Ĝi inkluzivas la urbajn kvartalojn kaj 6 guberniojn.

STARIGI INTERNACIAN HAVENON

En la enfluejo de Yangzi-rivero, Nantong similas al duoninsulo. Ĝia suda riverbordo longas 230 kilometrojn kaj havas abundajn dolĉakvajn riĉfontojn; ĝia orienta marbordo longas 206 kilometrojn kaj tie sterniĝas malprofundaj maretendaĵoj de pli ol 2 milionoj da muoj (15 muoj egalas 1 hektaron), inter ili pli ol 40 kilometroj da marbordo estas taŭgaj por konstrui profundajn ankrejojn por ŝipoj de pli ol 50 000 toneloj. La haveno Lŭsi (Ljusi), 32 marmejlojn norde de la enfluejo de Yangzi, estas tre ideala kandidato por konstrui profundajn ankrejojn krom Hongkongo, Ningbo kaj Dalian de Ĉinio, kaj la pli norda haveno Yangkou havas saman avantaĝon por tio.

Post kiam Ĉinio decidis rapidigi disvolvon de la ekonomia koridoro ĉe Yangzi-rivero, la delto kaj baŝeno de Yangzi-rivero fariĝis tre varma loko por enkonduko de enkaj eksterlanda kapitalo kaj por


teknika disvolvo, sekve grandkvanta importado kaj eksportado de energia riĉfonto, materialoj kaj produktaĵoj urĝe bezonas marbordan havenaron ĉe la enfluejo de Yangzi-rivero, kiu povos ludi la rolon kunligi la landinternon kun la marbordaj regionoj kaj la eksterlando kaj plenumi grandkvantan transŝarĝadon. Sed pro limigo de la alto de la pontoj super Yangzi-rivero ĉe Wuhan kaj Nankino, granda parto de la ŝipoj de pli ol 5 000 toneloj viglantaj en Yangzi bezonas ŝarĝadon ĉe Nantong; en la estonteco la profundaj havenoj de Nantong fariĝos nepre ankrejo de ŝipoj pli ol 50 000-tonelaj.


Por akceli la transjarcentan konstruadon de la ekonomia koridoro ĉe Yangzi-rivero, Nantong prenos la principon "prosperigi la urbon per haveno" kiel disvolvan strategion. Laŭ la ĝenerala plano

de Nantong, la industrioj formas laŭbordan strion kun la haveno kiel centro kaj la industriaj entreprenoj en sektora formo.

Estas tri konkretaj paŝoj. La unua estas starigo de ekonomia zono de havenoj ĉe la riverbordo kaj marbordo. La ĉefaj konstruaĵoj estos konteneriza kajo, plurfunkcia kajo kaj kajo de metalo, metaloido kaj erco ĉe la havenoj Nantong kaj Langshan, ĉe la haveno Jianghai la ĉefaj konstruaĵoj estas petrokemia kajo kaj kajo de industriaj produktaĵoj. En 2000 Nantong havos 25 haltejojn por ŝipoj pli ol 10 000-tonelaj, kaj la transŝarĝa povo superos 30 milionojn da tunoj. Laŭ la marborda disvolva modelo la ekspluata-prilabora tipo de riĉfontoj de malprofunda maro transformiĝos en ĉemaran prilaboran tipon, kiu prenos industriajn programojn kiel gvidparton por akceli disvolviĝon

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE YANGZI-RIVERO





En laborejo de la mebla limigita kompanio Fuhao investita de Nantong kaj Usono



Sur kontenerizita kajo

de la haveno, kaj sur la bazo de firmigo kaj altigo de la mara kaj marmalprofundaĵa bredado, fiŝkaptado, prilaborado de marproduktaĵoj, salfarado kaj salkemio, rapidigos la fruperiodan laboron de disvolvo de la havenoj Lŭsi kaj Yangkou, konstruos grandskalajn profundajn kajojn, pliigos petrolan en- kaj elŝipigon, stapladon, prilaboradon kaj la industriojn de elektro, petrolokemio, ŝtalo, ŝipkonstruado kaj ŝipriparado.

La dua estas starigo de ekonomia regiono por teknika disvolviĝo, alt-nova teknika regiono, liberkomerca regiono kaj pitoreskejo Langshan. Tio estas la unua fojo por Nantong, ke ĝi planis starigi liberkomercan regionon, nome fari liberkomercan stokadon, vendadon kaj prilaboradon en la areo de 6 kvadrataj kilometroj, kaj disvolviĝi paŝo post paŝo en liberan havenon kaj liberkomercan prilaboran regionon.

La tria estas, ke la urboj kaj gubernioj sub Nantong estos permesataj elekti lokojn por konstrui specialajn kajojn, disvolvi koncernajn industriojn kaj sin adapti al la plano de la tuta urbo, por ke la ekonomio montru la tendencon de ĉioamplaksa disvolviĝo.

RENKONTE AL LA DEFIO DE PUDONG

Nantong rigardas al Ŝanhajo

trans Yangzi-rivero, kaj ĝia natura medio similas al tiu de Ŝanhajo, tamen la ŝtato multe investis al Ŝanhajo, sed ne al Nantong. Tial, kiam Pudong de Ŝanhajo fariĝis varma ekonomia loko de Ĉinio kaj vekis pli kaj pli da atento, Nantong ŝajne estis flankenmetita. Tamen la popolo de Nantong ne volis resti senfara. Antaŭ la defio de Pudong la Nantong-anoj turnis la premon en movoforton. Nantong havas tre kompetentan urbestrion s-ino Xu Yan (Hju Jan). Foje ŝi vizitis Japanion kaj, forlasinte aeroplanon, ŝi tuj komencis diskonigi al iuj tre famaj japanaj translandaj korporacioj pri la investa medio de Nantong. Ŝia diskonigado gajnis fidon de japanaj komercistoj kaj vekis ilian intereson investi al Nantong, sekve de tio la urbestrino revenis kun nombro da kunlaboraj sugestoj.

Fremdlandaj komercistoj vidis, ke en iuj flankoj la kondiĉoj de Nantong estas malpli bonaj ol tiuj de Ŝanhajo, sed kompare kun aliaj urboj, Nantong havas sian superecon. Kiam Pudong estas faranta konstruadon de fundamentaj instalaĵoj kaj ankoraŭ ne plene maturiĝis la investa ŝanco, Nantong jam havas necesajn kondiĉojn. Krome, Pudong ne interesas investo de malpli ol 5 milionoj da usonaj dolaroj, sed Nantong akceptas investon de tiu sumo.

La Limigita Kompanio Haimeng de Nantong, investita de Ĉinio kaj Japanio, kiu ĉefe produktas subŝofon por altklasa vesto, jam en 26 monatoj akiris profiton egalan al la tuta investo de la unua periodo. Poste la fremdlanda entreprenisto kvarfoje aldonis investon. Sed la kuna investado validas nur 20 jarojn, kaj la fremda investinto sentis maltrankvilon. Por ke la fremda komercisto povu plu investi sen maltrankvilo en Nantong, la direktoro de la kompanio kaj la magistrato de Nantong kune klopodis kaj gajnis subtenon de la ŝtata ekonomio-komerca departemento, kaj faris la kompanion la unua en Ĉinio, kies kuna investado ne estas limigita en tempo. Jen kontentiĝis la fremda entreprenisto.

Laŭ statistiko, ĝis nun Nantong sankciis 430 entreprenojn de fremda investo. La popolo de Nantong kredas, ke Nantong estas tre grava en la disvolva strategio de Yangzi-rivero, ĉar disvolviĝo de la urbo akcelos la ekonomian disvolviĝon de la vasta regiono de norda Jiangsu-provinco. Nantong fariĝos ekonomia centro de la regiono.

PLI KAJ PLI FACILIĜOS LA TRAFIKO

Neperfekteco de trafikaj instalaĵoj estas granda obstaklo por starigo de havenurbo Nantong. Pro



Kajo de la haveno Langshan


tio en la lastaj jaroj la magistrato de Nantong donis grandan atenton al plibonigo de trafikaj kondiĉoj. Post preciza planado kaj konstruado, la flughaveno de Nantong jam estis malfermita en la fino de 1992. La pramlinio kaj altklasa ŝoseo inter Nantong kaj Changshu, urbo ĉe la suda bordo de Yangzi-rivero, jam transdoniĝis al trafiko. Krome Nantong planis konstrui 5.2-kilometran subriveran tunelon inter la ekonomia disvolva regiono de Nantong kaj Changshu, najbara al Ŝanhajo, kaj konstrui super Yangzi-rivero 2 200-metran ponton inter Nantong kaj Chongming-insulo (insulo en la enfluejo de

Yangzi-rivero). Antaŭ 1995, Nantong, kies surtera trafiko jam formis reton, havos specialan laŭriveran aŭtovojon al Nankino, la ĉefurbo de Jiangsu-provinco, kaj fervojon al la nordo. Tiuj konstruoj multe plibonigos la trafikon kaj ankaŭ investan medion de Nantong.

Supozeble kun disvolviĝo de Pudong Ŝanhajo fariĝos centro de financa informo de Ĉinio, dum ĝiaj industrioj translokiĝos en la najbarajn regionojn, kaj Nantong sendube fariĝos ideala loko por tiu translokiĝo.

Nantong en nokto






En ĉina-alilanda kruĉplakaĵa fabriko kun la plej granda laborejo en Ĉinio



Vesto-montrado



En laborejo de ĉina-alilanda elektronika limigita kompanio




FOSILIA DINOSAŬRO EN PEKINO

GERMANA leganto s-ro Eua Hoffmann skribis al nia redakcio, ke en germana ĵurnalo li legis la raporton pri trovo de fosilia dinosaŭro en Pekino, kaj deziris, ke ni faru pli detalan raporton pri tio. Mi konsultis prof. Zhao Xijin (Ĝaŭ Ŝjiĝin), kiu laboras en la Instituto de Vertebra Paleontologio kaj Paleoantropologio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj.

Prof. Zhao Xijin, ĉina aŭtoritata fakulo pri dinosaŭroj, sin okupis per la studo de pli ol 30 jaroj. Li esploris fosiliajn dinosaŭrojn en Xinĵiang (Sjingĵang), Tibeto, Sichuan, Yunnan, Shandong kaj la Interna Mongolio kaj gvidis restituadon de pli ol dek skeletoj de dinosaŭro. La fosilia skeleto de la plej granda dinosaŭro en Ĉinio — dinosaŭro (*Hadrosaur*) en Zhucheng (Ĝuĉeng), Shandong — estis restituita sub lia gvidado en 1992. Prof. Zhao multfoje vizitis Usonon kaj Eŭropon por interŝanĝi opiniojn kun eksterlandaj fakuloj kaj liaj disertaĵoj estis alte taksataj internacie.

La dinosaŭroj, pratempej reptilioj en la mezozoiko (antaŭ 240-67 milionoj da jaroj), estis “regantoj” sur la tero kaj malaperis ĉiuj en la lasta periodo de la mezozoiko. La dinosaŭroj vivis sur tero aŭ ĉe marĉejo. Iuj el ili estis karnovoraj kaj la aliaj — herbovoraj. Estis diversformaj dinosaŭroj. La plej granda el ili longis je dekoj da metroj kaj pezis je ĉirkaŭ 40-50 tunojn, dum la plej malgranda longis je malpli ol unu metro. En Pekino estis malmulte da stratumoj en la mezo-

Prof. Zhao Xijin (maldekstre) direktas restituadon de fosilia dinosaŭro.



zoiko kaj neniam antaŭe estis trovita fosilia dinosaŭro, tial la ĉi-foja trovo havas grandan signifon en scienc-esploro.

La trovo estis hazarda. La 9-an de junio 1993, kiam la grupo de geologoj de la Pekina Muzeo de Natursciencoj kaj Ĉina Geologia Akademio faris esploradon pri stratumo en la kretaceo (antaŭ 137-67 milionoj da jaroj) kaj kolektis fosiliajn specimenojn ĉe Chongqing-akvokonservejo en Fangshan de Pekino, la juna doktoro Tian Shugang trovis la fosilion. Li ne povis konstati, ĉu ĝi estas fosilia dinosaŭro, kaj portis ĝin al prof. Zhao Xijin por peti lian helpon.

Prof. Zhao konstatis post esploro, ke ĝi, 40-50-centimetra osta fosilio, estas la meza parto de maldekstra ripo de la vertebraro de dinosaŭro, kaj ambaŭ ekstretoj perdiĝis. Laŭ la grandeco de la osta fosilio, prof. Zhao supozis, ke la herbovora dinosaŭro longis je pli ol dek metroj kaj pezis je dekelkaj tunoj. Tamen inter la samspecaj dinosaŭroj ĝi estis nur mezgranda.

La konstato altiris al si la atenton de sciencistoj. Por plua esploro prof. Zhao kaj aliaj venis al Chongqing-akvokonservejo. Ĉirkaŭ la akvokonservejo estas stratumo el konglomerato kaj sabloŝtono, kie oni trovis la fosilion. Inter sabloŝtonoj troviĝas ankaŭ granda nombro da fosiliaj vegetaloj, kio montris, ke siatempe tie fluis rivero. La geologia epoko de la stratumo datumas de 100 milionoj da jaroj. Prof. Zhao opinias, ke oni akiros pli gravan trovon ĉirkaŭ la akvokonservejo, se oni daŭrigos la fosadon.

Prof. Zhao diris, ke la trovo de fosilia dinosaŭro ne nur havas gravan signifon por studi pri la faŭno de la kretaceo en Pekino, precipe por studi pri la evolua historio de la dinosaŭroj, sed ankaŭ donis ege gravajn sciencajn bazojn al la esploro pri la paleogeografia medio, paleoekologio kaj leĝo de migrado far dinosaŭroj en Pekino, kaj al la konfirmo kaj komparo de kontinenta stratumo en la mezozoiko.

Mi esperas, ke prof. Zhao, dr. Tian kaj iliaj kolegoj havos pli grandan trovon kaj restituos la fosilian skeleton de pekina dinosaŭro kiel eble plej frue. ■

ĈINA OLEPENTRAĴA ARTO EN PROGRESO

de YI MING


KOMPARE kun la 1-a Ĉina Olepen-
traĵa Ekspozicio okazinta en 1991, la
penetraĵoj de la 2-a ekspozicio en 1993
multe progresis en la nivelo. Nun oni
povas diri, ke la ĉinaj olepentristoj
eniris en la periodon de relative matura kreado.

En la ekspozicio estis eksponataj 200 olepen-
traĵoj elektitaj el la 3 000 verkoj de ĉinaj olepentris-
toj. La eksponaĵoj kun diferencaj stiloj kaj temoj
montras la fortan strebadon de la pentristoj por la
arto. Pligrandiĝis la lerteco de esprimo, precipe la
aplikado de materialoj por plejparto da verkoj.
Ĝenerale, la penetraĵoj prezentas lirikan realismon,
aŭ pli-malpli gravigas la formon kaj stilon surbaze
de realismo. La vizitantoj de la ekspozicio sentis
la diversecon de stiloj, formoj kaj temoj.

Aljuĝantoj de la ekspozicio unuanime honoris
per ora medalo la verkon "Pasanta Viro" de Shi
Chong. Iuj opinias, ke ĝi plej komplete enkorpigas
la evoluadon de la nuntempa olepenetraĵa arto.
"Pasanta Viro" figuras gipsan viron, sur kies kor-
po ĉie videblas fendoj de gipso. La premiita verko
iagrade montras, ke la valornormo de la nuna ĉina
olepenetraĵo estas en "meza zono", t.e., la penetraĵo
devas prezenti la realan vivon, sed ne nur la
realan vivon. Ĝuste tia estas tiu ĉi verko, kiu ne
estas versimila kiel en foto, sed vidigas la kontu-
ron de la korpo. La verko "Pasanta Viro" per
klasika realismo konigas modernan konscion, hav-
igas al la viro profundan signifon: Li, kiel repre-
zentanto de la homaro, iras de la pasinteco al la
estonteco.

La penetraĵo "Patrino kaj Filo" de Yan Ping
plenas de humaneco. La simplaj linioj de konturoj
fluas kvazaŭ sono, kiu formas harmonian kaj kor-
tuŝan movimenton. La gracia liberstila esprimo de
la verko montras la artismon de la pentristino.

Fronte al la interfero de la variĝo de penetraĵoj,
la ĉinaj olepentristoj finfine trovis novan vojon al




Marŝanta Viro

de SHI CHONG

la diverseco de la stiloj. Inter la elektitaj verkoj
ekzistas stiloj realisma, lirikisma, simboliga, abs-
trakta, novrealisma k.a. Kvankam iuj verkoj estas
en provado, tamen ili sentigas la vivecon de la
ĉina pentrista rondo. Ekz., la abstrakta stilo de
penetraĵoj en Ĉinio ne disvolviĝis plene en la pas-
intaj multaj jaroj, sed en tiu ĉi ekspozicio troviĝis
verkoj en abstrakta stilo. La kreado en la abstrak-
ta arto jam antaŭis la teorion studon tiurilate.
Dume, per libera, forta kaj ŝanĝiĝema pentrado la
esprimivaj pentristoj montras sian komplikan an-
imstaton kaj sian fervoron al la socio. Tiaj estas la
verkoj "Splitiĝinta Songo" de Zhang Xiaogang
(Ĝang Ŝjaŭgang) kaj "Fikcia Verko" de He Sen.

Pri la studo de la olepenetraĵa lingvo menciin-
das la verko "Vojo al Baishan-monto" de Zhao
Kaikun. Per ŝanĝiĝo de linio kaj interkruciĝo de
formo kaj stilo la arta lingvo de tiu ĉi penetraĵo
esprimas la kontraŭstaron inter malpacienca kaj
sinreteno de la artisto — tio ja estas la plej kortuŝa
parto de la arta lingvo. ■



Reto de LENG JUN



Akvolando de QIU RUIMIN



Floroj de YAO YONG

Knabino de XU GUANGDI



Patrino kaj Filo de YAN PING



MARHIRUNDO

KIAM mi estis maristo, miaj amikoj ofte demandis al mi, kion mi timis plej forte, navigante sur la vasta maro. Mi respondis; "Mi ne timas fortan venton, nek furiozan ondon, sed solecon."

Ĝis hodiaŭ, kiam mi rememoras pri la morta soleco sur la senlima maro, tiu timo ankoraŭ turmentas min. Mi kelkdek fojojn veturis en la India Oceano. La ŝipo naviganta fore de la kontinento similas al safo orfe iranta sur senlima stepo. En tiu senlima spaco sub la libera ĉielo kaj sur la vasta maro, krom la ŝipo estis nenio. Oni ne vidas rokon, birdon, nek herbon. Radiodisaŭdigo fariĝis neaŭdebla, oni jam tediĝis pri malnovaj paroltemoj. Kaj ĉiuj silente laboris kaj manĝis.

Foje aminda birdeto rompis tiun enuigan atmosferon.

Jam pasis 3 tagoj, de kiam nia ŝipo trapasis markolon. Suferante de la soleco, ni fariĝis sentaj kaj senfortaj. Post matenmanĝo, mi kaj aliaj maristoj

purigis ferdekon per altprema akvofusilo. Sub la arda suno marakvo fariĝis blindige blanka. Mi pafis akvon al la ĉielo, kun falanta marakvo falis malgranda birdo, plaŭdante per siajflugiloj. Ni tuj ĉirkaŭis ĝin.

"Ne vundu ĝin!" la maljuna ĉefmaristo laŭte kriis.

Frotinte la manojn, mi prenis la birdon sur la manplaton. Ĝi tiel timis, ke tremis ĝia tuta korpo. Ĝiaj nigrajflugiloj estis similaj al tondiloj, belaj okuloj similaj al nigraj bidoj, pintaj ungoj similaj al jujubarbaj branĉetoj. La ĉefmaristo diris al ni, ke ĝi estas marhirundo, kaj la mevo kaj marhirundo estas amikoj de maristoj. Kiam vi navigas sur vasta maro, la ŝvebantaj maraj birdoj konigas al vi, ke la ŝipo proksimiĝas al la tero.

Kompreneble, ni, ĉiam sopirantaj pri marbordo, tre amas tiun malgrandan birdon. Ĝi vekis plurajn demandojn en ni: Kiam ĝi atingis nian ŝipon? Kial ĝi povis fali el la aero? Ĉu ĝi laciĝis aŭ estis trafita aŭ vundita de altprema akvofusilo?

Ni ne kuraĝis lasi ĝin forflugi, ĉar ni timis, ke ĝi falos en maron. Mi portis ĝin en kajuton kaj atenteme nutris ĝin. Ĝi prenis rondan fenestron kiel sian neston, kie mi metis bovlon da dolĉa akvo. Ĉiutage mi manĝigis ĝin per salikokaĵo kaj krabaĵo. Kelkajn tagojn poste, ĝi familiariĝis kun ni. Ĉiufoje kiam mi revenis en kajuton, ĝi levis sian voston, gaje kriis kaj petoleme saltis sur mian ŝultron aŭ kapon. Kaj mi etendis brakon, lasis ĝin resti sur mia manplato kaj murmuris al ĝi. Dank' al ĝi, mia soleco kaj izoleco malaperis.

Ni ne tenis ĝin en kajuto longe, timante, ke ĝi perdos la kapablon flugi. Tage ni lasis ĝin flugi super la ferdeko. Vespere ĝi revenis al ni, batante laflugilojn kaj senĉese kriante. Ĝi donis al ni grandan plezuron.


La marhirundo akompanis nin dum la navigacio. Sur la revena vojo, kiam ni trapasis la markolon, ni ne lasis ĝin forflugi. Kiam la ŝipo proksimiĝis al la bordo de Bohai-mar, Ĉinio, escepte de la deĵorantoj ni ĉiuj venis sur la ferdekon por lasi ĝin forflugi. Tio estis solena momento. Preninte la marhirundon el miaj manoj, la maljuna ĉefmaristo saltis sur la holdan tegmenton kaj alte levis ĝin super la kapo. La deĵoranta maristo sonigis longan sironon, tiam la marhirundo flugis sagrapide al la ĉielo. Ĝi ŝvebadis super nia ŝipo, ŝajnis, ke ĝi ne volis disiĝi kun ni. Kiam ĝi flugis al la blua ĉielo, super la blankaj marondoj, ni demetis la ĉemizon kaj svingis al ĝi. Mi emociiĝis ĝis larmoj. ■



ALILAND- ANOJ EN PEKINO

Teksto kaj fotoj de DA WEI


Sub la gvido de ĉiĉerono




Septembro kaj oktobro estas ora sezono por turisma vojaĝo en Pekino. Ĉiujare en tiu tempo la urbo altiras multajn alilandanojn.

Ĉie en la centra regiono de Pekino, de Tian'anmen-placo ĝis Wumen-pordego de la Imperiestra Palaco, de Jingshan-parko ĝis la strato Donghuangchenggen, troviĝas alilandaj turistoj. Iuj sidas en aŭtomobiloj, aliaj en rikiŝoj, triaj biciklas kun mapo de Pekino. Inter ili estas ankaŭ fakuloj, komercistoj kaj entreprenistoj laborantaj en Pekino.


"Mi gustumas ĉinajn vermiĉelojn."







En rikiŝoj

Por mallongigi iradon




Biciklado






Ili konsultas vojaĝmapon.



Li aĉetas birdkaĝon.





En kurso de vesto-montrado



Trejnado de komputeristoj

ZHOU DAPING:

Profesia edukado en Ĉinio

EN la pasintaj dek jaroj la ĉina profesia edukado, kiu emfazas instruadon de profesiaj scioj kaj kapabloj, havis pli grandan avantaĝon en la moderniga konstruado de Ĉinio.

En Ĉinio la nombro de mezgradaj profesiaj lernejoj kreskis de 8 200 en 1981 al 18 100 nun kaj la nombro de lernantoj — de 1.96 milionoj al 7.39 milionoj. Anstataŭ la ŝtata monopoligo de funkciigo de lernejoj, aperis profesiaj lernejoj diversformaj kaj diversgradaj.

Antaŭe Ĉinio sukcesis funkciigi profesiajn lernejojn depende de la subteno far entreprenoj, ekspluati lernejan industrion kaj reformi la sistemon pri labordono al diplomoj, tamen ne okazis radikala ŝanĝiĝo en profesia edukado. Ekz., la mezgradaj profesiaj lernejoj ne

povis varbi pli multajn lernantojn pro manko de necesaj kondiĉoj. En la venontaj sep jaroj antaŭ 2 000, ĉiujare en Ĉinio pli ol 20 milionoj da homoj atendas laboron. Inter ili, krom 700 000 diplomoj de altaj lernejoj, ĉiuj aliaj devos ricevi profesian instruadon. En 1992 la totala nombro de lernantoj varbitaj de la mezgradaj profesiaj lernejoj en Ĉinio estis nur tri milionoj; la profesia edukado en malsamaj regionoj kaj fakoj disvolviĝis mal-ekvilibre, malrapide precipe en la kamparo kaj postiĝintaj regionoj; estis multaj problemoj pri la instruado de inĝenieraj kaj agrikulturaj sciencoj; kaj la koncernaj leĝoj kaj politikoj por garantii la disvolviĝon de profesia edukado ankoraŭ ne ellaboriĝis. Ĉion ĉi kaŭzis la detenado farita de koncernaj departementoj pri ekonom-

io, financo kaj imposto kaj la sistemo pri labordono.

Kio estas elirejo de la ĉinaj profesiaj lernejoj?

PARTOPRENO DE ENTREPRENOJ

Prudentuloj de la ĉina eduka rondo opinias, ke la ĉinaj entreprenoj devas pli multe partopreni en profesia edukado. Por garantii kaj plialtigi la kvaliton de siaj produktaĵoj en la intensa internacia konkurenco, ĉiuj entreprenoj devas multe atenti la kulturadon de kompetentuloj.

Por kvalifiki la laborantojn, ĉinaj profesiaj lernejoj provas la sistemon de la akto pri profesia kvalifikiteco, kio multe helpas la ekonomian konstruadon. Precipe post la partopreno de Ĉinio en la Ĝe-

nerala Konvencio de Tarifo kaj Komerco kaj post la unuigo de ĉinaj ekzamenaj kriterioj kaj akta sistemo kun tiuj uzataj internacie, Ĉinio multe plifortigos sian kapablon en la internacia konkurenco.

La entreprenoj ludas gravan rolon en la garantio de la kredebleco de la akto, ĉar ili estas ne nur aŭtoritatoj por konfirmi la kapablon de diversaj laborantoj, sed ankaŭ laborigas ilin en siaj branĉoj. Tial la entreprenoj nepre devas difini la celon, organizi la ekzamenon kaj disdoni la aktojn por la profesiaj lernejoj; subteni sian profesion edukadon materie kaj intelekte; kaj antaŭenpuŝi sian profesion trejnadon.

Nun la vilaĝaj kaj privataj entreprenoj estas grava konsistiga parto de la ĉina nacia ekonomio, sed ilia teknika povo estas malpli forta ol tiu de la grandaj kaj mezgrandaj ŝtataj entreprenoj. Funkciigi profesion lernejon estas malfacile por malgrandaj vilaĝaj kaj privataj entreprenoj. Tial por ili nepre necesas la helpo de grandaj entreprenoj.

VOJO NEPRE IRATA POR FUNKCIIGI LERNEJON

Por la profesiaj lernejoj havi eksperimentan bazlokon kaj industrian por kombini la instruadon kaj produktadon estas rimedo por solvi la problemon pri lerneja elspezo kaj ankaŭ estas la vojo nepre

irata por la disvolviĝo de profesia lernejo.

En 1992 la ĉinaj profesiaj lernejoj havis pli ol 8 000 industriajn entreprenojn, kun neta enspezo de 700 milionoj da juanoj. La Dalian-a Martransporta Lernejo, Suzhou(Suĝoŭ)-a Malpezindustria Lernejo, Zuoyun-(Zuojun)-a Teknika Lernejo de Shanxi(Ŝanŝji) kaj aliaj enspezis milionojn da juanoj en jaro respektive. La Praktika Arta Lernejo de Pekino starigis la Monisan Fasonvestan Kompanion, kies vestoj estas titolitaj per unu el la dek famaj fabrikmarkoj en Ĉinio.

La supre menciitaj lernejoj, depende de siaj avantaĝoj, ekspluatas siajn proprajn projektojn per pruntepreno de mono kaj penas plialtigi la kvaliton de produktaĵoj, tiel ke la kondiĉoj de la lernejoj pliboniĝis.

Oni permesis, ke surbaze de memvola partopreno kaj reciproka utilo diversaj profesiaj lernejoj organizu kune kompanion aŭ industrian grupon.

Nun profundigas la reformado de la sistemo pri labordono al diplomitoj. En la pasinta jaro estis ellaborita la politiko, ke ĉiuj diplomitoj de diversaj profesiaj lernejoj, krom tiuj, kiujn speciale bezonas la ŝtato, povas elekti sian profesion rekte en labormerkato kaj la dungantoj siaflanke povas elekti ilin laŭ sia bezono. Multaj

entreprenoj praktikas la principon de "enoficiĝo post trejnado", t.e., ili varbas lernantojn, kiuj fariĝos novaj laborantoj post profesia trejnado.

BONE FUNKCIIGI LA PROFESIAJN LERNEJOJN


Sin liberigante de la kateno de la planizita ekonomio kaj adaptante sin al la bezono de la kunekzistado de pluraj ekonomiaj posedsistemoj, Ĉinio klopodas bone funkciigi diversajn profesiajn lernejojn kaj trejnajn centrojn por fondi la kompletan sistemon de profesia edukado, kiu inkluzivas la reformadon de profesiaj lernejoj kaj ties fundamentan konstruadon.

Por determini la pozicion kaj rolon de profesia edukado en la ĉina moderniga konstruado kaj rapidigi ĝian disvolviĝon, Ĉinio ellaboras la Leĝon de Profesia Edukado. Per ĝi oni preparas sin ĉefe por solvi la jenajn problemojn:

Unue, reguligi la sistemon de profesia edukado. Konsidere al la situacio de la administra sistemo de la profesia edukado kaj surbaze de la principo, ke la Ŝtata Eduka Komisiono faru unuecan planadon kaj la aliaj fakoj kaj lokaj organizoj ĉiuj oferu sian servon, oni starigos laŭ la leĝo la administran sistemon por vekti la aktivecon de ĉiuj fakoj kaj entreprenoj kaj faciligi makroreguligon.


Due, difini la respondecon de entreprenoj. La disvolviĝo de profesia edukado strikte rilatas al la ekonomia disvolviĝo kaj la partopreno de entreprenoj, tial necesas doni leĝon por difini la respondecon de entreprenoj por profesia edukado. Ekz., la investo por la fundamenta konstruado kaj por ekspluatado de novaj projektoj devas inkludi certan sumon por profesia edukado; la konstruado kaj importado de grandaj kaj mezgrandaj projektoj devas iri sinkrone kun la profesia trejnado de laborantoj; kaj la ŝtato donas impostan favoron al la entreprenoj, kiuj faras investon al la profesia edukado. ■

Praktiko de kuir-arto




La Printempa Festo en la kamparo

Fotoj de LU ZHONGMIN kaj SUN YI



Lanternoj por la festo



Ruĝaj paperoj kun bonaŭgura versduo

Preparado de tradicia manĝaĵo por la festo



Oni aĉetas novjarajn bildojn kaj ruĝajn paperojn kun versduo.



La unua tago de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas la unua tago de la tradicia Printempa Festo de Ĉinio kaj komenco de printempo.

Tiutage ĉie en la kamparo regas gaja atmosfero. Oni iluminas sian domon kaj eksplodigas petardojn por bonvenigi la feston. En la ĉambroj oni gluas novjarajn bildojn kaj ruĝajn paperojn kun versduo. Gejunuloj prezentas programerojn por pligajigi la feston. En la festo ĉiuj familianoj kolektiĝas kaj la parencoj vizitas unu alian por ĝoje pasigi la tradician feston.



Stilz-irantoj

Prezentado de tradicia programero





La loĝkvartalo Fangzhuang

MEI ZHI:

Por havigi domojn al urbanoj

ANTAŬ sep jaroj mia oficejo disponigis al mi domon kun plankareo de 14 kvadrataj metroj, tiel ke mi kaj mia edzo kaj nia 2-jara filino havis nian hejmon. Siatempe mi pensis, ke la domo estas tre malvasta por trimembra familio. Sed miaj amikoj diris al mi, ke en Pekino multaj junuloj ne povas geedziĝi pro dommanko, multaj geedzoj kun infanoj ne havas domon kaj multaj trigeneraciaj familioj

loĝas en unu sama ĉambro. Poste mi informiĝis, ke tiam en la tuta Ĉinio estis milionoj da familioj, kies pokapa loĝareo ne atingis du kvadratajn metrojn. Ili havis grandan malfacilon en loĝado kaj la ŝtato devis helpi ilin solvi la malfacilon.

Tial, sub tiuj cirkonstancoj havi komfortan domon ja estis plej granda deziro de sennombraj ĉinoj. Kun la kreskanta vivnivelo en la pasintaj jaroj, la deziro pli kaj pli fortiĝis. Por kontentigi la

deziron Ĉinio enpaŝis en la novan etapon de domkonstruado por urbanoj.

Laŭ statistiko, de la fino de la 70-aj jaroj ĝis la komenco de la 90-aj jaroj, Ĉinio investis 411.12 miliardojn da juanoj por domkonstruado, 11.1-oble pli multe ol tiuj en la antaŭaj 30 jaroj, kaj konstruis loĝdomojn kun plankareo de 1.78 miliardoj da kvadrataj metroj, 3.3-oble pli multe ol tiuj en la sama periodo. Pli ol 30 milionoj da familioj transloĝiĝis en



Loĝdomoj en la strateto Ju'er

novajn domojn, kaj la pokapa loĝareo de urbano kreskis de 3.6 kadrataj metroj al 7.3. Antaŭ nelonge, la Konstrua Ministerio de Ĉinio deklaris, ke jam ne troviĝas en la lando tiaj familioj, kies pokapa loĝareo ne atingis du kvadratajn metrojn. Ministro Hou Jie (Hoŭ Ĝje) emfazis, ke en la venontaj jaroj la ĉina registaro pluaŝe akcelos domkonstruadon.

En la alta tajdo de la konstruado mia familio adiaŭis la malnovan domon kaj enloĝiĝis en apartamento kun du ĉambroj. Ankaŭ miaj amikoj ricevis novajn domojn. Kvankam la loĝkondiĉoj en nia lando ne estas tiel bonaj, kiel tiuj en la evoluintaj landoj, tamen kompare kun la pasinteco, ili multe pliboniĝis. Ekz., en Pekino konstruiĝis loĝdomoj kun plankareo de 26 milionoj da kvadrataj metroj en la lastaj kvin jaroj kaj 400 000 familioj transloĝiĝis en novajn domojn. Mi propraokule vidis, ke altaj etaĝdomoj starigas unuj post aliaj kaj la urbo mem plivastiĝis kelkoble. La novaj kvartaloj plibeligis la antikvan Pekinon.

En la mezo de la 80-aj jaroj komenciĝis provkonstruado de kvartaloj en Pekino laŭ la principo de unueca projektado, sinteza

eksploatado, kompletiga konstruado kaj energia kaj bona ŝparado. Sub la kondiĉo ne altigi aŭ iomete altigi konstrukoston, la kvalito de kvartaloj estis pli bona ol tiu de la antaŭaj en la tuteco. Nun en Ĉinio estas 4 000 novaj kvartaloj racie strukturitaj, plurfunkciaj kaj ĉirkaŭataj de verdaĵoj.

Samtempe kun tio, la ĉina registaro rekonstruis malnovajn kvartalojn, kie multaj familioj loĝis en kadukaj, malaltaj kaj malvastaj domoj. Chongwen (Ĉongŭen)-distrikto estas movoplena en Pekino. En ĝi multaj domoj estis konstruitaj antaŭ cent aŭ ducent jaroj. Iuj el ili estis tre kadukaj. Nun anstataŭ ili okulfrapas altaj loĝdomoj kaj luksaj komercaj domegoj. Ĉ. 30 000 familioj transloĝiĝos en novajn domojn.

Dum multaj jaroj en Ĉinio praktikiĝis bonstatiga distribua sistemo pri loĝdomoj por urbanoj. Ĝin karakterizis tre malalta lupago kaj konstrumonc asignita de magistrato. Rezulte de tio, la domkonstruado iris malrapide, kio kaŭzis teruran mankon de loĝdomoj. Por radikale solvi la problemon, en la 80-aj jaroj la ĉina registaro ellaboris la politikon, ke

la ŝtato, kolektivo kaj individuo kune pagu por domkonstruado. La politiko atingis bonan sukceson.

La dommanko estas sufiĉe okulfrapa en Ŝanhajo kun la plej granda loĝantaro el la ĉinaj urboj. Fine de la 80-aj jaroj Ŝanhajo ekpraktikis la sistemon de komuna fonduso por loĝdomoj, t.e. loĝantoj elprenas etan parton el sia salajro kiel komunan fonduson por domkonstruado.

Kaj fine, en nur unu jaro akumuliĝis miliardo da juanoj.

Juer(Ĝuer)-strateto en Pekino estas unu el la lokoj, kie multaj malnovaj domoj devas esti rekonstruitaj. Tie la novaj diversaltaj etaĝdomoj estas en kortoj interkomunikiĝantaj kaj strukturitaj en tradicia formo de Ĉinio. Sed ne ĉiuj malnovaj loĝantoj povas enloĝiĝi en novaj domoj. Se iuj volas loĝi tie, ili devas elspezi por aĉeti novan domon. S-ro Ma diris al mi, ke nun lia familio loĝas en du apartamentoj aĉetitaj kontraŭ lia malnova domo kaj ĉ. 50 000 juanoj. Kompreneble, la malnovaj loĝantoj ĝuas favoran prezon por aĉeti domon. Tiamaniere oni povas akiri monsumon por konstrui pli da domoj.

Lastatempe la ĉina registaro deklaris, ke en 2000 ĉiu familio havos unu apartamenton kaj la pokapa loĝareo atingos ok kvadratajn metrojn. Por realigi laŭ celon, en la venontaj sep jaroj oni devos konstrui loĝdomojn kun plankareo de 1.35 miliardoj da kvadrataj metroj. Nun la kadukaj loĝdomoj kun areo de 30 milionoj da kvadrataj metroj en la ĉinaj urboj devas esti rekonstruitaj. ■

Filozofio de Laozi — Observu la leĝojn de la natio

de HOU JUELIANG

CINA filozofo Laozi, kiu vivis antaŭ 2 500 jaroj, figure diris, ke “la regado de lando similas al kuirado de fiŝetoj”. Je la unua rigardo oni eble opinias la sentencon iom stranga, ne sciante, kiun filozofiaĵon ĝi enhavas. Kial li faris la komparon per la tute malsamaj aferoj?

Pripensinte, vi konos ĝian raciecon. Ĉu vi povoscias kuiru fiŝojn? Por bone kuiru fiŝetojn, vi devas uzi mildan fajron kaj ne turni ilin senbezone, alie la fiŝetoj misformiĝos kaj la kuirado tute fuŝiĝos.

Laozi estis filozofo observema kaj pensema. Li opiniis, ke administrado de ŝtato estas sama kiel kuirado de fiŝetoj. Oni devas observi la leĝojn de la naturo kaj ne fari senbride kaj kontraŭleĝe. La popolo plej forte timas, ke la regantoj agas senbride kaj kontraŭleĝe. Laozi opiniis, ke se la regantoj ne komprenas la ŝanĝiĝojn kaj objektivajn leĝojn de la naturo, ili kondukas senbride kaj subjektive. Tio estas malfeliĉa aŭspicio kaj la rezulto neimagebla. Li opiniis ankaŭ, ke oni devas trakti la ŝtatajn aferojn naturalisme kaj sen devigo, laŭ la naturaj leĝoj.

En la jaroj, kiam vivis Laozi, Ĉinion dividis multaj regnestroj. Tiam estis multaj sociaj problemoj, la popolo vivis mizere. Laozi metis sian esperon bone administri la ŝtaton sur “prudentajn monarkojn”, dirante, ke prudentaj kaj bonkoraj monarkoj bone scias la popolajn aferojn, agas laŭ la popola volo, ne insistas ekskluzive pri propraj opinioj, ofte “prenas la volon de la popolo kiel la sian” kaj administras la ŝtaton kun amo al la popolo. Sekve, tiaj monarkoj administras la ŝtaton laŭ la popola volo kaj ne devigas la popolon fari tion nek malpermesas ilin fari alion. Laŭ Laozi en la naturo la estaĵoj kreskas libere, ankaŭ la popolo devas vivi libere kiel la estaĵoj en la naturo. Ekz. la popolanoj strebas por spirita libereco, do la monarkoj praktiku indulgemaĵajn politikojn laŭ la popola volo, por ke ili vivu komforte kaj agrable, sen spirita kateno; la popolanoj malamas ekspluatadon, do la monarkoj mal-

multe prenu de ili imposton; la popolanoj deziras riĉiĝi, do la monarkoj ne ĉasu profiton kun ili por ne bari al ili la riĉigan vojon; kaj la popolanoj malŝatas tiel multe da registaraj malpermesoj, do la monarkoj ne plu publikigu ilin.

La monarkoj, kiuj traktas la ŝtatajn aferojn naturalisme kaj sen devigo, donas al la popolo liberecon, sekve la lasta ne timas ilin. La monarkoj, kiuj ne havas burokratan sintenon, estas “amataj kaj laŭdataj” de la popolo. Kontraŭe, iuj monarkoj tiranas kaj fortigas sian regadon per severaj kriminalaj leĝoj, ilin la popolo “timas”. Iuj putriĝintaj monarkoj kondukas senbride kaj kontraŭleĝe, ilin la popolo “malestimas”.

Despotoj kaj sentalentaj monarkoj regas ne laŭ la naturaj leĝoj, kio kaŭzis seriozajn sociajn problemojn, kiaj malsato, malriĉeco kaj ŝtelado. Analizante kaŭzojn de tiuj sociaj problemoj, Laozi diris: “La popolo malsatas pro troa impostado de la regantoj.” “La popolo malriĉas pro abundo da malpermesoj kaj la ŝtelistoj furiozas pro multiĝo de leĝoj.” Li atribuis la kaŭzojn de la sociaj problemoj al la regantoj, kiuj praktikis erarajn politikojn kaj arbitre publikigis ordonojn.

La socia problemoj, plej atentata de Laozi, estis granda diferenco inter riĉuloj kaj malriĉuloj. Iuj havis “abundon” da riĉaĵo, neniam elkonsumebla, dum aliaj malfacile sin vivtenis, havante “nesufiĉon” da vestaĵoj kaj nutraĵoj. Kiel solvi la problemon de diferenco inter la “abundo” kaj “nesufiĉo”? Laozi pledis por malpliigo de enspezoj al riĉuloj kaj pliigo de tiuj al malriĉuloj por malgrandigi la diferencan inter ili. Fakte la doktrino estis racia. La monarkoj kaj regantoj devis adopti ĝin kaj ellabori konvenajn politikojn por efektiviĝi ĝin. Tamen ili ne nur ne malgrandigis la diferencan inter riĉuloj kaj malriĉuloj, male ili prenis tro pezan imposton de malriĉuloj kaj praktikis la politikon “ekspluati la malriĉulojn por nutri riĉulojn”. Tio estis ege malracia kaj tute kontraŭa al la popola volo kaj la naturaj leĝoj.

Senraciaj kaj maljustaj agoj de la regantoj serioze damaĝis la interesojn kaj produktan aktivecon de la popolanoj, rezulte de tio “la kampoj dezertiĝas kaj la ŝtata kaso malplenas”. Malgraŭ tio, la regantoj senĉese diboĉis. “Ili sin vestas per luksaj kostumoj, portas kun si akrajn armilojn, satigas sin per delikataj manĝaĵoj kaj havigas al si abundon da mono kaj trezoro.” Sed de kie venis iliaj mono kaj trezoro? Laozi asertis, ke tio rezultis el la politiko “ekspluati la malriĉulojn por nutri riĉulojn”. Li opiniis la fenomenon ege malracia kaj insultis ilin kiel ĉefrabisojn.

Laozi diris: “La popolanoj ne abonemus la regantojn, se tiuj ne subpremigus ilin.” Tamen la eraraj politikoj “ekspluati la malriĉulojn por nutri riĉulojn” akriĝis la kontraŭdiron inter la regantoj kaj



popolanoj, kaŭzis la publikan malkontenton kaj socian tumulton. En tia situacio la monarkoj kaj regantoj ne agis laŭ la popola volo, nek reduktis ilian imposton por mildigi la konflikton, sed male, per sia potenco ili praktikis severajn kriminalajn leĝojn por subpremi la popolanojn kaj minacis ilin per mortigo. Sed Laozi tion ne aprobis. Li avertis: “La popolanoj ne timas morton. Kial do vi timigas ilin per mortigo?” Laozi diris ankaŭ, ke la popolanoj ne plu povos vivi, ofte minacataj per mortigo, ili flamiĝos de indigno kaj leviĝos al morta batalo kontraŭ la regantoj. Se la popolanoj ne timos minacon, okazos do granda tumulto. Senbrida regado estas efemera same kiel ŝtormo.

Se la socio estas regata de haoso, la regantaro opiniis, ke la popolanojn estas malfacile briditi. Kiu estas kulpa en tio? Ĉu la popolo? Ne. Laozi diris: “Malfacila regado super la popolanoj kaŭziĝas de la ambicia regado de la regantoj.” Ĉi tie la “ambicia regado” aludis senbridajn agojn kontraŭ la popola volo far la regantoj, la lastaj ellaboris kaj efektivigis multajn registarajn kaj prohibajn ordonojn kaj leĝojn kaj devigis la popolanojn obei ilin. Pro tio okazis tumulto. Oni devas atribui la kulpon al la regantoj. Laozi faris ĝustajn observadon kaj analizon. Ĉe la regantoj li trovis la kaŭzon de la socia haoso.

Trovinte la kaŭzon de malfacila regado super la popolo, Laozi konsilis al la regantoj ne plu vivi diboĉan vivon nek ĉasi profiton kaj lasi la popola-

nojn libere disvolviĝi, vivi kaj labori gaje kaj trankvile. Laŭ Laozi, se nur la regantoj ne agus facilanime kaj senkonsidere, ne damaĝus nek malhelpus la popolanojn, do ĉio fariĝus facila. La popolanoj povus kulturi sin mem, riĉiĝi kaj honestiĝi. Kaj ankaŭ homa naturo povus fariĝi denove sincera kaj honesta. Ĉiuj restus senavidaj kiel bebo en lulilo, kaj ŝanĝiĝus la malbonaj sociaj moroj kaj ne plu ekzistus reciproka superruzo nek intrigo inter homoj.

Ke Laozi kontraŭstaris “avidecon” kaj “senbridecon” de la regantoj, tio estis prava. Tamen estis erare, ke li limigis al la popolanoj decajn dezirojn. Homoj devas havi dezirojn kaj ne vivi ĉiam kiel bebo “sen pensado kaj deziroj”. Sen deziro ne estas strebado, sekve la socio ne disvolviĝus kaj la homoj longtempe vivus simplan vivon kiel en la primitiva socio. Fakte, tio kontraŭstaras al la filozofia penso “observi la leĝojn de la naturo” de Laozi mem. La movfortoj de la libera disvolviĝo ja estiĝis de la homa aspiro kaj strebado. Unuflanke li pledis por libera disvolviĝo, aliflanke li limigis al la popolanoj aspiron, kio montris memkonflikton en kombinaĵo de la doktrino kun la praktiko. Malkontenta pri la socia mallumo kaj tumulto kaj ne trovinte ĝustan eliron, Laozi volis returni la socion al la antikva kaj fermita, kie “najbaraj landoj aŭdas unu de la alia kokerikon kaj bojadon, sed ilia popolo neniam intervizitas”. Sed la historio ne povas iri returnen, ĝi antaŭeniras senĉese. La homa socio pli kaj pli larĝe malfermiĝas. Tio estis tute ne atendita de Laozi. ■

Helpema varma lineo

de XIAO NAN

KNABINO kun larmoj en la okuloj forkuris el sia hejmo, ĉar ŝi malsukcesis en la ekzameno kaj estis riproĉita de sia patrino. Ŝi telefonis sian plendon al la servo "Helpe al Mez-kaj Element-lernejoj". En la telefonado fervora admono de granda amiko kvietigis ŝin.

Maljuna geedza paro estis ĉagrenita pro sia difektita gasforno. Ili ne sciis, kie oni povas ripari ĝin, kaj alkonectis la varm-linean telefonon de informoj 160. Post nelonge oni rekomendis iun riparejon, kiu ne nur rebonigis ilian gasfornon, sed ankaŭ purigis la oleozan fulgoellasan aparaton kaj aliajn ekipaĵojn en la kuirejo.

Kun la senĉesa disvolviĝo de la socia ekonomio, rapide pliiĝas la nombro de hejmaj telefonoj kaj la funkcioj de telefono fariĝis pli kaj pli multaj. Per telefono oni plenumas la tradiciajn funkciojn, kiaj publika afero, homa kontakto, reciproka saluto, demando pri veterprognozo, horoj, televida programo, telefon-numeroj kaj alvoko de policoj. Nun telefono havas ankaŭ novajn funkciojn kun epokaj trajtoj. Per telefono oni faras konsultojn pri psika stato, informoj kaj medicinaj aferoj. Nun ankaŭ la ĵurnalisma rondo havas varm-lineajn telefonojn, kiuj reduktas la tempan, spacan kaj psikologian distancojn inter la homoj. Oni povas solvi demandon kaj akiri taŭgan helpon nur per telefon-alvoko.

VERŜI KORON

En Ĉinio la plej frua kaj plej multe uzata varma lineo estas tiu de psika konsulto. Oni petas helpon de la lineo pri siaj ĉagreno kaj malfeliĉo en la studo, laboro, persona kaj familia vivo kaj eĉ malakordo en la homa kontakto.

Ekzistas pluraj specoj de varmaj psikokonsultiĝaj lineoj. Iuj servas por helpi mez-kaj element-lernejojn kaj gejunulojn, ekz. "Intima Fratino", "Helpe al Mez-kaj Element-lernejoj" kaj "Psikokonsultiĝa Servo por Gejunuloj". Aliaj servas por multspecaj petantoj, ekz. "Por Virinoj" pri virinaj kaj edziniĝaj problemoj; "Sano",

"Venerologio" kaj "Kontraŭ Aideso" ĉefe pri psikologio, fiziologio kaj sano; "Psikologia Savo" kaj "Espero" helpantaj ĉefe psikopatojn, deliktulojn kaj tiujn, kiujn turmentas psika krizo.

Februare de 1988, ekfunkciis la varma lineo "Intima Fratino", la unua varma lineo por gejunuloj. De tiam ĝi ricevis telefonadon de pli ol 20 000 personoj el 20 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. La gejunuloj rigardas la lineon kiel sian intiman amikon. En Chengdu, Nankino kaj aliaj urboj ankaŭ gepatroj de iuj geknaboj verŝis sian koron al la "Intima Fratino".

La telefono por psika konsulto fariĝis ponto de interhoma komunikiĝo. Se oni estas ĉagrenata aŭ spirite turmentata, oni povas verŝi sian koron al iu nekonata, sed fervora kaj helpema homo kaj inter-

Telefonistinoj en la servo de informo-konsulto





Televida oferto



La informa kaj teknika kompanio Tongke de Pekino servos ankaŭ per telefona konsultiĝo.

paroli kun li pere de la varma lineo, tiamaniere oni bone sin konsolas. Pri tio iuj diris, ke oni sentas sin pli bone, se nur oni eldiras sian malĝojon. Helpate de la psika konsulto, deliktuloj akiris esperon kaj tiuj, kiuj volis sin mortigi, sin elliberigis el la psika krizo, kaj denove harmoniigis la geedzoj, kiuj preskaŭ eksedziĝis.

ĈIOPOVAJ LINEOJ

En Pekino, se vi alkonectas la varm-linean telefonon de informoj 160 kaj levas la aŭdilon, vi tuj aŭdas fervoran voĉon: "Saluton! Parolas la servo de Informa Konsulto." La servo jam fariĝis speciala konsilanto en la vivo por pekinanoj. Se oni havas demandon pri vestoj, manĝaĵoj, loĝejoj kaj veturiloj, se oni volas scii informojn de iu ajn vendejo, deziratajn varojn, teknikon aŭ informojn pri vendo, klientoj kaj kooperado, oni povas demandi la servon kaj ricevi kontentigan respondon. De post sia ekfunkcio en 1992, la servo jam ricevis telefonadon de 250 000 homoj, meznombro ĉiutage ĝi ricevis telefonadon de 2 000 homoj.

Oni deziris 100 parojn da flegistinaĵoj kaj petis helpon de la varma lineo por trovi fabrikanon de la ŝuoj. La varma lineo multe klopodis kaj fine plenumis la peton de la ŝuo-bezonanto.

La akciuloj de Pekino bone scias la plej freŝajn akciajn informojn de Ŝanhajo kaj Shenzhen pere de la varma lineo.

Iu kompanio trovis problemon en sia kontrakto subskribita kun alia entrepreno kaj demandis la Servon de Informa Konsulto, kion oni devas fari por protekti siajn interesojn. Laŭ informo de la servo la kompanio ĝustatempe solvis la problemon kaj malpliigis la ekonomian perdon.

"Televida Vendejo" estas dezirata formo kombinanta televidon kun telefono por aĉetado. Oni volas aĉeti deziratan varon en malpli da tempo. La Pekina Televizio nun elsendas la programon "Televida Vendejo". Kiu varo plaĉas al vi, vi povas telefoni al la koncerna vendejo. Tiu do portas la varon en vian hejmon.


En Ĉinio funkcias pluraj varmaj lineoj de informa konsultado. Se la servo ne povas tuj respondi al la demandanto, ĝi notas la nomon, adreson kaj telefonnumeron de la demandanto. Ĝi konsultas koncernajn entreprenojn kaj iniciative respondas al la demandanto. Ekde sia ekfunkcio la servo 500-foje faris tian respondon.

AŬSKULTI LA VOĈON DE LA POPOLAMASO


Utiligante sian superecon, ĉinaj amaskomunikiloj funkciigas varmajn lineojn de legantoj, aŭskultantoj kaj rigardantoj, kiuj koncentre montras la gravajn problemojn zorgatajn de la popolamaso kaj ludas la rolon de popola kontrolo kaj reprezentanto de la publika opinio. Samtempe la varmaj lineoj donas ŝancon al la popolamaso disvastigi informojn de la gazetoj, radiodisaŭdigoj kaj televido. La varma lineo "Novaĵoj" funkciigata de la Pekina Popola Radiostacio estas ĉiam atentata de la publiko. Ĉiutage ĝi ricevas telefonadon meznombro de 70 homoj. Pere de la varma lineo oni konigas informojn kaj eldiras siajn opiniojn pri gravaj novaĵoj kaj sociaj aferoj. La varma lineo ankaŭ rapidigas solvon de iuj problemoj.

Krome, la registaroj kaj jurisdikciaj departementoj de multaj lokoj aranĝis varmajn lineojn, kiaj telefono de la urbestra kabineto, pordenunca telefono de disciplin-inspekta departemento kaj tiu de la asocio de konsumantoj. Tiuj ĉi telefonoj ĝenerale strikte ligiĝas kun la popola vivo, ĝustatempe konigas al la registaroj la publikan opinion, kiu estas bazo por gvidantoj decidi ion.

Estas vere, ke la varmaj lineoj multe oportunigas la popolan vivon, tamen, katenite de la nuna teknika nivelo, iuj lineoj ne estas perfektaj, la datenoj de la informa reto estas nekompletaj. Pro tio iam ili ne povas ĝustatempe solvi la problemon de la demandantoj. Oni havas malfacilojn ankaŭ en kolektado kaj aldono de informoj por la reto, la konsilantoj devas esti sisteme trejnataj, kaj la lineoj estas ofte okupataj kaj oni devas longe atendi. Ĉio ĉi devas esti riparita kaj komprenata de la socia publiko. ■



Kaligrafado



Ludo kun nepino

La vivo de maljunuloj

Ĉiuj maljuniĝas. Aranĝi la vivon de maljunuloj estas afero tre grava por Ĉinio kun plej granda loĝantaro en la mondo.

Ĝenerale, la ĉinaj maljunuloj aranĝas sian vivon tiel: luj flegas nepojn. Ili konsistigas grandan parton de la ĉinaj maljunuloj. Aliaj laboras kiel konsilanto aŭ instruisto. Kaj triaj interesiĝas pri kaligrafado, pentrado, korpa ekzerca-

Teksto kaj fotoj de DA WEI

En promenejo



Gaja rido





Gemaljunuloj festantaj sian feston

do, **ĉigong-o**, danco k.a. Nun en ĉiuj distriktoj de Pekino funkcias universitato aŭ trejna kurso de maljunuloj. Krome, iuj maljunuloj promenas surstrate kun birdo en kaĝo aŭ ludas kartojn en promenejo.

La 9-a tago de la 9-a monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas la Festo de Ĉinaj Maljunuloj. Tiutage oni prezentas programerojn por amuzi la maljunulojn.

Avino kaj nepo



Monkolekto por Fondaĵo EPĈ-abono

Pro altiĝo de la kostoj de eldonado kaj sendado de "El Popola Ĉinio" ni reguligas de la pasinta jaro la abonkotizon kiel jene: la jara abono (inkluzive de sendokostoj) por la evoluantaj landoj kaj evoluantaj landoj respektive estas 26,00 kaj 14,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloraj valutoj ŝanĝeblaj en usonajn dolarojn. Pro tio la plejmulto de niaj legantoj en la orienteŭropaj landoj, la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj la evoluantaj landoj, kiuj havas grandan malfacilon en ekonomio, ne povas plu aboni nian revuon. La reduktiĝo de abonantoj pli altigis la produktokoston de nia revuo kaj devigis nin malpliigi ekde ĉi tiu numero la kolorajn bildojn. Ĉi tie ni petas de niaj legantoj komprenejon kaj pardonon.

Konsiderante ilian fortan

deziron daŭre legi nian revuon, ni decidis establi FONDAĴON EPĈ-ABONO, per kiu ni pagos la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj kaj esperantistaj aktivuloj de la supre menciitaj landoj. Ni elprenos parton de la rentumo de Ghiselin-Fondaĵo de "El Popola Ĉinio" kiel bazan monsumon de FONDAĴO EPĈ-ABONO. (Tio tute konformas al la deziro de la belga samideano Charles Ghiselin, kiu testamentis, ke lia heredaĵo al EPĈ estu uzata por disvolvo de Esperanto.) Samtempe ni kore petas, ke esperantistoj de la landoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monoferu al FONDAĴO EPĈ-ABONO por helpi la nepagipovajn samideanojn. Bonvenas eĉ malgranda sumo. Ni ĉiujare aperigos en nia revuo la nomon kaj ofersumon de ĉiuj donacintoj. Helpemuloj bonvolu sen-

di monon (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) al la konto A/C No. 71411749 je la nomo From People China (El Popola Ĉinio) ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio). La adreso de la Banko de Ĉinio estas: Fuchengmennei Dajie, CN-100818 Beijing, Ĉinio. Sendante monon, bonvolu sciigi al ni pri la celo de la oferita mono kun kopio de la banka ĉeko. Oni povas sendi ankaŭ monbiletojn (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) rekte al ni en registrita koverto. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via konsidero kaj monofero al FONDAĴO EPĈ-ABONO!

La Red.

SENTENCOJ DE FILOZOFOJ

SENTENCOJ DE ZHUANGZI

Zhuangzi (369-286 a.K.), heredanto de la doktrino de Laozi, estis sagaca filozofo. Foje li songis, ke li fariĝis papilio. Kiam li vekigis, li konfuziĝis, ĉu li transformiĝis en papilion aŭ papilio en lin. Li pledis por relativismo kaj eksplikadis inversan pensmanieron: rimarki malbonon en bono kaj bonon en malbono.

Kiu emas flati vidalvide, tiu emas ankaŭ kalumnii post la dorso.

Dentoj sen lipoj suferas de malvarmo.

En akvo fiŝoj vivas, dum homoj mortas.

Ne venku per intrigo, nek per perforto.

Arbo rekta — hakita la unua, puto dolĉa — elĉerpita la plej frua.

Eĉ la ĉielo malgrandiĝas rigardate tra tubo.

Maro estas vasta, ĉar ĝi ĉiujn riverojn ricevas.

Ĉu ne estas vana laboro inunde irigacii en pluvo?

Ĉu ne estas tragedio por sovaĝa anaso longigi ĝiajn mallongajn krurojn kaj por gruo mallongigi ĝiajn longajn krurojn?

Reago al Fondaĵo EPĈ-abono

Post kiam ni aperigis en la julia numero 1993 la anoncon pri monkollekto por Fondaĵo EPĈ-abono, venis al ni tre pozitiva reago. Iuj donacis monon, aliaj demandis, kiamaniere sendi monon. Inter la linioj de la reagaj leteroj ni legis ne nur simpatian al esperantistoj en landoj kun financaj malfaciloj, sed ankaŭ subtenon al nia revuo. Ni prenu sinon Alice Amalia Klein el Brazilo kiel ekzemplon. Ŝi skribis, ke nun en Brazilo la minimuma monata salajro estas 50,00 usonaj dolaroj, kaj ŝi ne estas riĉa. Tamen por la amo al nia revuo ŝi sendis 50,00 usonajn dolarojn por trijara abono kaj donacis la reston al Fondaĵo EPĈ-abono. Ni estas tre kortuŝitaj de ŝia amo al nia revuo. Kaj ĝuste pro tia amo multaj samideanoj abonas kaj abonigas nian revuon. Ĉi tie ni kore dankas ĉiujn donacintojn kaj abonantojn.

Donacoj al Fondaĵo EPĈ-abono helpas ne nur al la Esperanto-movado en landoj kun financaj malfaciloj, sed ankaŭ al la daŭra ekzisto de nia revuo. Ni esperas, ke niaj legantoj ne nur daŭre abonos nian revuon, sed ankaŭ laŭeble helpas la nomitan fondaĵon, ekzemple per diskonigo kaj monkollekto dum esperantistaj renkontiĝoj.

Iuj skribis, ke nun la monsendo pere de banko

al Ĉinio estas relative multekosta. Sekve ni proponas pagi la abonon kaj donaci monon pere de Universala Esperanto-Asocio (UEA), t.e. sendi monon al la konto (elpc-e) de nia revuo ĉe UEA.

Jen la unuaj donacoj al Fondaĵo EPĈ-abono (ĝis la 5-a de novembro 1993):

Belgio: Elfriede Ernst (1000,00 aŭstriaĵ ŝilingoj). **Brazilo:** Alice Amalia Klein (5,00 usonaj dolaroj). **Finnlando:** Tapio Sormunen (222,00 finnaj markoj). **Francio:** Antonie Rispal (500,00 francaj frankoj); Anonime (34,00 usonaj dolaroj). **Germanio:** Alfred Court (10,00 usonaj dolaroj); Albercht Kronenberger (100,00 usonaj dolaroj); Erich Seidemann (20,00 germanaj markoj); Bruno Vogelmann (200,00 nederlandaj guldenoj). **Italio:** Gorni Ginevra (100,00 aŭstriaĵ ŝilingoj); Giuseppe Trambaiolo (16000,00 italaĵ liroj); Dina Zanichelli (16000,00 italaĵ liroj). **Japanio:** Ken'iti Matumoto (345,00 usonaj dolaroj); Itabasi Tutomu (5000,00 japanaj enoj). **Meksikio:** Julie Regal (15,00 usonaj dolaroj). **Svedio:** Gunnar Nilsson (10,00 usonaj dolaroj). **Svisio:** Dieter Rooke (50,00 svisaj frankoj).

Refojan elkoran dankon al ĉiuj donacintoj!

La Red.

PURIGI ORAĴOJN

Ĉiuvespere metu viajn orajn fingroringon, kolieron kaj aliajn oraĵojn en malgrandan ujon, enverŝu en ĝin iom da lesivo kaj diluu ĝin per malvarma akvo, ĝis la oraĵoj estas mergitaj. En la sekvanta mateno elprenu ilin el la likvaĵo, lavu ilin en pura akvo kaj ne forte brosu ilin por forigi malpuraĵon. Se vi ĉiutage tiel faras, la oraĵoj brilos kiel novaj.

MALLACIGI LA OKULOJN

Plurhora legado, skribado aŭ tajpado antaŭ fluoresko-ekrano lacigas la okulojn, ke vin dolor-



as la okuloj kaj ankaŭ la kapo.

Laŭ fiziologio, ne estas la okuloj mem, kiuj trolaboras, sed la du okulmovaj sistemoj — la ciliaro por akomodi la konveksecon de kristalino kaj la muskolo por movi la okulojn.

Sed kiel mallacigi la okulojn? Antaŭ ĉio, vi devas havi sufiĉan heleon en la kabineto

kaj de tempo al tempo palpebrumi, ordinare, unu fojon po kvin sekundoj. Kiu longtempe okule laboras, devas rigardi foran vidaĵon kelkajn minutojn en ĉiu dua horo, por malstreĉi la okulojn, antaŭ ol daŭrigi la laboron, kio povas komfortigi la okulojn.

Faru jenan ekzercadon: Fiksu sur muro kvar slipojn, ĉiu kun du-tri latinaj literoj sur si, laŭ la horloĝaj tempopunktoj n-roj dek du, tri, ses kaj naŭ. Sidiĝu ĉe tablo kaj rigardu la slipojn laŭvice dekstrume kelkajn fojojn kaj poste faru la samon livume. Tio povas mildigi la lacigon de la okuloj. ■



S-ro Zhao Jiyong

LŪ MINGQI:

Fabrikanto de skorpia veneno

S-RO Zhao Jiyong (Ĝaŭ Ĝjjjong) de Yantai, Shandong-provinco, estas fama pro sia fabrikado de trinkaĵoj de skorpia veneno.

SKORPIA VENENO SAVIS LIN

S-ro Zhao estis instruisto. Aŭtune de 1988 lin atakis hepatito B kaj li kuŝis en hospitalo. Lia malsano graviĝis tagon post tago. Lia ventro bareliĝis pro ascito. Li falis en malesperon.

Li faris testamenton kaj iris sur la tegmenton de la hospitalo por..., sed li hezitis. Tiomomente en lia kapo aperis la figuroj de liaj edzino kaj du malgrandaj infanoj. Kaj li revenis hejmen kun la intenco preferi morti en sia propra domo.

Artikoloj pri bredado de skorpioj vekis lian atenton. Li pensis, kial li ne provas la skorpian venenon, ĉar ĝi havas kuracan efikon. Li do aĉetis 100 vivajn skorpiojn kaj ekbredis ilin en nova ĉambro. Ili kreskis dank' al lia flegado. Pro la okupiteco li eĉ forgesis la malsanon. Foje, kun ĝojo li tuŝis skorpion per sia mano, sed la skorpio forte pikis lin. Li sentis neelteneblan doloron. Stranga juko trakuris lian tutan korpon kaj tuj poste lin atakis spasmio. Li pensis, ke la Morto lin vizitas. Sed tute ekster lia atendo, poste li sentis sin treege komforte kaj agrable.

Ĉu skorpia veneno povas kuraci hepatajn malsanojn? S-ro Zhao kun espero manĝis plurajn vivajn skorpiojn. Pasis duonjaro. Kiam li refoje vizitis hospitalon por korpa ekzameno, la kuracisto, kiu kuracis lin antaŭe, apenaŭ kredis, ke la hepataj funkcioj de s-ro Zhao tute normaligis.

KURAĜA PROVO

Ĉin-medicinaj kuracistoj prenas sekigitajn skorpiojn kiel medikamenton, ĉar ili, dolĉetaj kaj venenaj, estas efikaj por kvietigi spasmon kaj doloron. Ili estas uzataj por kuraci infanan konvulsion, kapdoloron kaj doloron pro reŭmatismo. S-ro Zhao antaŭe jam sciis tion, kaj la ĉi-foja saviĝo profundigis lian konon. Li sciis, ke la esenco de skorpio estas ĝia veneno, sed kiamaniere ekstrakti la venenon?

Li veturis al Pekino, legis multajn medicinajn verkojn en grandaj bibliotekoj, konsultis profesorojn kaj aliajn fakulojn kaj fine posedis la teknikon ekstrakti venenon el vivaj skorpioj. Ĉar oni ne povas

longe konservi la skorpian venenon, tial oni devas prilabori la venenon en pulvoron. Tio estas kompleksa tekniko, ĉar oni ne devas malpliigi la efikajn elementojn de la veneno nek konservi la superfluan akvon kaj aliajn netaŭgajn elementojn. S-ro Zhao veturis al la Medikamenta Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, kun pulvoro de skorpia veneno prilaborita de li mem. Sed la ekspertizo montras, ke la kvalito estas ne bona. Li ne deprimiĝis. Li kune kun iu vilaĝo fondis fabrikon de pulvoro de skorpia veneno kaj kontraktis kun la Pekina Farmacia Instituto pri testo de la medikamenta kvalito. Finfine li akiris sukceson en prilaborado de bona pulvoro de skorpia veneno.

Por koni la taŭgan dozon de la skorpia veneno, s-ro Zhao kaj lia edzino faris danĝeran provon. Foje li prenis grandan dozon kaj komatis tri tagojn kaj du noktojn. Vekiginte, li ne havis forton ellitiĝi, sed lia edzino sukcese kuracis sian dismenoreon kaj hemikranion per la dozo.

Observante la principon preventi malsanon kaj sanigi sin mem, s-ro Zhao esploris manĝaĵojn kun skorpia veneno kaj sukcesis. Li nomas tiajn manĝaĵojn skorpi-venena manĝaĵ-serio, kiu inkluzivas pocijon de skorpia esenco, ladmanĝaĵojn de tutaj skorpioj, frititajn skorpiojn kaj vinon kun paro da skorpioj.

Aprile de 1991 la sanprotektaj manĝaĵoj kun skorpia veneno fabrikataj de s-ro Zhao trapasis la teknikan ekspertizon de la higiena departemento kaj estis sankciitaj por fabrikado.

FABRIKADO DE VENENAĴOJ

La pocio de skorpia esenco fabrikita de li el skorpia veneno estas efika por reguligi la homajn korpo-funkciojn, akceli la metabolon kaj pliigi la ĉelan vigecon. Ĝi estas efika por preventi kaj kuraci malsanojn de la nerva kaj kardiovaskula sistemoj. Pro tio ĝi estas tre ŝatata en la merkato.

En la sekvantaj du jaroj s-ro Zhao fondis fabrikojn kune kun entreprenistoj el Taiwan, Hongkong, Pekino, Sichuan, Yunnan kaj Dalian. Lia afero rapide prosperiĝis. Nun liaj entreprenoj fariĝis granda korporacio, kiu povas produkti ĉiujare 10 milionojn da ampoloj da pocio de skorpia esenco kun produktvalorulo de 100 milionoj da juanoj. ■

ĈINAJ ĜARDENOJ EN LA MONDO

Kun pli kaj pli ofta kontakto de Ĉinio kun la mondo, ĉinaj ĝardenoj fariĝis unu el la gravaj enhavoj en kultura interŝanĝo de Ĉinio kun la eksterlando. Post kiam la ĝardeno Mingxuan, imitaĵo de la klasika ĝardeno de Suzhou, Ĉinio, eksponiĝis en Novjorko, ĉina ĝardena arkitekturo vekis pli kaj pli grandan intereson de la mondo.

En la lastaj jaroj Ĉinio konstruis multajn ĉinstilajn ĝardenojn en diversaj landoj. En 1983 oni konstruis en Munkeno de Germanio ĝardenon Fanghua por la munkena internacia ĝardena ekspozicio. La ĝardeno kovris 530 kvadratajn metrojn. En duonjaro pli ol 8 milionoj da homoj vizitis la ĝardenon, kaj la ĝardeno gajnis oran medalon de Germanio en la konkurso pri naciaj ĝardenoj. En 1988 ĉinoj konstruis en Vieno ĝardenon Shufang en la pitoreska danuba parko. La ĝardeno estis enkorpigita je la orienta tradicia ĝardena arkitekturo kaj la moderna okcidenta dekoracio. La ĝardeno okupanta 6 000 kvadratajn metrojn altiras al si ĉiutage multajn vizitantojn. Antaŭ nelonge la ĝardeno Menghu estis inaŭgurita en Montrealo de Kanado. Ĝi estas la tria ĉinstila ĝardeno en Kanado. La ĝardeno kun areo de 2.5 hektaroj kaj enhavas kioskojn, palafitojn, lageton kaj arkan ponton. En januaro 1993 la Ĉina Umea Ĝardeno estis inaŭgurita en la Monda Umea Ĝardeno en Hyogo de Japanio. Ĝi altiris al si multajn vizitantojn.

Ĝis nun ĉinoj jam konstruis 30 ĝardenojn de diversaj stiloj en 15 landoj kaj regionoj de Nord-Ameriko, Eŭropo, Azio kaj Afriko. La ĉinaj klasikaj ĝardenoj pontis inter la popoloj ĉina kaj alilandaj.

ESPLORADO DE PARALELA KALKULADO EN ĈINIO

Esplorado pri paralela kalkulado de ĉinaj matematikistoj atingis la mondan nivelon kaj vekis atenton de matematikistoj eksterlande. Koncerna internacia instituto deklaris, ke la Oka Internacia Simpozio de Regiona Malkombina Ordo okazos en Pekino en 1994.

La rapideco de kalkulado de unuopa komputoro jam atingis cent milionojn da fojoj po sekundo, tamen ĝi ankoraŭ ne povas konformiĝi al la bezono de la progresantaj ekonomio, sciencoj kaj tekniko de la mondo, tial sciencistoj en la mondo serĉadas novan elirejon, kaj multaj landoj metas la paralelan traktadon kaj esploron de paralela kalkulado en la fronton de plano de scienc-teknika progreso de la 90-aj jaroj. Ankaŭ Ĉinio rigardas ĝin kiel

gravan taskon por la ŝtatnivelaj gravitaj laboratorioj de la Ŝtata Naturscienca Fonduso, la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la "Sciencoj kaj Inĝenieria Kalkulado".

Laŭ la reala stato de Ĉinio, la grupo de la Kalkula Centro de la Ĉina Akademio de Sciencoj decidis fari esploron pri paralela kalkulado sur la nivelo de matematika-fizika modelo, por ke la sukceso de la esplorado certgrade liberigu de apogo sur konkreta konsisto de paralela maŝino.

Oni prenis "regionan malkombinon" kiel la unuan esplorobjekton, konsiderante, ke "regiona malkombino" havas kaj gravan teoriant signifon kaj vastan perspektivon de praktikado; krome la esplorado entenas pli da matematika enhavo, kio estas kongrua al la karaktero de ĉinaj matematikistoj, kaj oni povas pli facile atingi la celon pli frue puŝi la esploron de paralela kalkulado al la internacia fronto.

En la pasintaj kelke da jaroj la grupo prelegis 8 disertaciojn en internaciaj seminarioj, iuj fruktoj de la esplorado jam estis aplikataj en inĝenieria praktikado, kio metis bazon por ellaborado de paralela praktika programo kun kompare granda elmontrado kaj kulturis specialistojn.

VILAĜO DE RAKONTOJ

En Hubei-provinco de Ĉinio estas vilaĝo Wujiagou (Uĝjagoŭ) enfermita de montoj. Sed ĝi estas vilaĝo de popolarakontoj kaj nomata "viva fosilio de antikva kulturo". La vilaĝo konservas abundon da popolarakontoj, proverboj kaj enigmoj.

La vilaĝo havas areon de ĉ. 4 kvadrataj kilometroj. La kvietanta antikva vilaĝo situas en bela medio kaj konservas en multaj flankoj antikvajn kutimojn kaj tradicion de produktado kaj vivo. La vilaĝanoj bone rakontas popolarakontojn. 5 maljunuloj en la aĝo de pli ol 70 jaroj memoras centon da rakontoj. La 72-jara kamparano Li Defu havas bonegan memoron kaj povas rakonti 350 popolarakontojn. Li estas multe respektata en la vilaĝo.

La rakontoj de la vilaĝo temas pri mito, fantazio, fantomo, popola moro, fabelo, humuraĵo kaj biografio de personoj. La enhavoj de la rakontoj tuŝas kaj la antikvan kaj la nunan tempon, kaj la lingvo estas tute natura, sen afekta prilaborado. Multaj el la rakontoj montras antikvan pensmanieron de la vilaĝanoj.


Por la vilaĝanoj la popolarakontoj estas kiel natura lernolibro, kiu helpas ilin koni la historion kaj admonas ilin ami la hejmlokon kaj laboron, respekti grandaĝulojn kaj fideli al amo. Danke la heredon de la folkloro kaj la edifon de la rakontoj pri tradiciaj bonaj virtoj, la vilaĝanoj havas relative altan klercon.

EKONOMIO

- Antaŭ nelonge finkonstruiĝis la ĉefa linio de fotokabla telekomuniko, longa je 4 700 kilometroj kaj trapasanta ok provincojn kaj municipojn de norda kaj suda Ĉinio. Ĝi estas la plej longa en la mondo kaj disponigas 105 000 longdistancajn cirkvitojn, kio multe mildigas la telekomunan strececon en Ĉinio.

- Pli ol 7 000 ŝtataj magazenoj en Pekino alprenis la metodon de privata entreprenado. Laŭ la principo apartigi posedrajton disde administr-rajto oni luas ŝtatajn magazenojn kaj administras ilin per sia kolektita monsumo por puŝi ŝtatajn entreprenojn al merkato kaj levi ilian ekonomian efikon.

- Dank' al la subteno de la Ekspuata Programo de UN, la giganta projekto "Programoj de Ĉinio por la 21-a Jarcento" estas kompilita. Pli ol 300 fakuloj el 50 organizaĵoj partoprenis en la kompilado. Ĝi traktas pri industrio, agrikulturo, trafiko, transportado, loĝantaro, energio, riĉfonto k.a. Ĝi estas grava dokumento pri la mediprotekta politiko de Ĉinio kaj altiras la atenton en la mondo.



Germana specialisto (maldekstre) en la Pekina Piana Fabriko

- En la pasintaj dekelkaj jaroj ĉ. 300 000 fakuloj el pli ol 50 landoj kaj regionoj venis en Ĉinion por helpi la ĉinan konstruadon.


Laŭ antaŭkalkulo, ĝis 1995 la nombro de invititaj alilandaj fakuloj superos 140 000. Ili okupiĝos ĉefe pri ekonomia administrado, internaciaj komerco kaj financo k.a.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Lastatempe Ĉinio sukcese provfaris nov-

generacian okdirektan sismografon. Koncernaj fakuloj opinias, ke tio estas grava frukto de la esplorado pri prognozo de tertremo.

Fakuloj opinias, ke en la centralizo kaj liberigo de la terkrusta premo antaŭ tertremo, per la elektromagnetaj ondoj, senditaj el la rokaj stratomoj profunde de la tero al ties surfaco, oni bone vidas la proceson de tertrema evoluo. En aparta frekvenca distanco ili aperas en formo de korpusklo. Sed kutime oni opinias, ke ili aperas en formo de ondo. Post kontrolado de rokoj en malsamaj profundoj subtere la nova aparato povas prognozi pli-ol-5-gradan tertremon okazontan en spaco kun perimetro de kelkcent kilometroj, kaj pli-ol-7-gradan tertremon okazontan en spaco kun perimetro de mil kilometroj.



La komputero "Lakta Vojo II" ekuzata

- Ekfunkciis la nova sistemo pri prognozo de la mezperioda veterstato de la unua superkomputero "Lakta Vojo II" provfarita en Ĉinio. Tio markas, ke Ĉinio estas unu el la malmultaj landoj, kiuj povas anonci la prognozon de la mezperioda veterstato. La operacia rapideco de tiu komputero atingas miliardon da fojoj ĉiusekunde. Ĉiutage ĝi povas aŭtomate kolekti kaj trakti milionojn da datenoj pri la atmosfero, senditaj de ĉiuj observatorioj kaj meteostacioj de la mondo, kaj laŭ ili oni povas raporti pri la atmosfera ŝanĝiĝo sur la tero kaj pri la vetero de ĉiuj ĝiaj partoj en la tuj venontaj sep tagoj.

- Ĉina juna sciencisto prof. Zhang Jie (Ĝang Ĝje) laboras en la Oksforda Universitato de Britio. Lastatempe, en la lasera eksperimentado de X-radioj en kompleksa sistemo, li sukcese akiris

X-radian laseron kun ondolongo de 18.2 nanometroj kaj gajna koeficiento de 12.5 centimetroj kaj per tio kreis la mondan novan rekordon de la gajna koeficiento de la X-radia lasero.

KULTURO

● Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Mao Zedong, forpasinta gvidanto de Ĉinio, post “Elektitaj Verkoj de Mao Zedong” aperis “Elektitaj Artikoloj de Mao Zedong” en pluraj volumoj. La unua kaj dua volumoj eldonitaj en 1993 enhavas multajn gravajn artikolojn, parolojn, telegramojn, leterojn, raportojn k.a., kiuj estis verkitaj en 1921-1976 kaj ne aperis en “Elektitaj Verkoj de Mao Zedong”. Granda nombro da verkoj inter ili estas unuafoje publikigitaj.

● La 74 partoj de la unua laŭtema sinteza libro “Granda Enciklopedio de Ĉinio” estas jam eldonitaj post 15-jara kompilado. La libro ampleksas sume 77 859 artikolojn kun 125 milionoj da ĉinaj ideografiaĵoj kaj traktas pri filozofio, literaturo, edukado, inĝenierio, naturaj sciencoj, sociaj sciencoj kaj aliaj 60 fakoj.

● Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 ĉinaj erudiciuloj kaj personoj de la literatura kaj arta rondo elsavis pli ol dek milionojn da specoj da preskaŭ malaperintaj diversnaciaj kantoj, tradiciaj proverboj, popolaj rakontoj, teatroj, muzikoj, dancoj k.a. Ĉinaj arkeologoj riparigis pli ol 1 000 palacojn, antikvajn loĝdomojn, ŝtonkavernojn kaj ruinojn kaj konfirmis 350 000 vidindaĵajn ruinojn. Surbaze de tio, Ĉinio difinis 258 gravajn historiajn vidindejojn protektatajn de ĝi.

TURISMO

● De la lastaj jaroj pitoreskaj naturaj vidindaĵoj kaj diversnaciaj moroj en nordokcidenta Ĉinio estas ekspluatataj kiel turisma riĉfonto. Tie la transirado de dezerto, montgrimpado, ĉevalrajado sur herbejo, ĉasado sur altebenaĵo, boatnavigado sur la Flava Rivero, enketado pri glacirivero, spertado en la popola vivo k.a. altiras pli kaj pli multajn alilandajn turistojn.



Kazaha paŝtistino de Xinjiang akceptas turistojn.

SPORTO

● En la 31-a de oktobro de la lasta jaro kvin ĉinaj sportistinoj unuafoje partoprenis en la konkurso de Maratono okazinta en Hispanio. Ili okupis la unuajn kvar lokojn kaj gajnis la virinan teaman ĉampionecon. Wang Junxia (Ŭang Ĝunŝja) la unua atingis la finon per 2:28'16".

Du sportistinoj de Hispanio okupis la kvinan kaj sesan lokojn.

MEDICINO

● Post multjara esplorado la Ĉina kontraŭsenila Centro de Nantong, Jiangsu(Ĝjangsu)-provinco, prenis eltiritan freŝan venenon de araneo kiel medikamenton, kiu efike kuracas malsanojn de cerbaj angioj, tumorojn k.a.

● La enketo farita de koncerna departemento diris, ke la unua longvivulo de Ĉinio estas kamparano Gong Laifa en Guizhou. Li naskiĝis en marto 1862, 1.4-metre alta kaj pli ol-30-kilogramme peza. Dum la tuta vivo li okupiĝas pri terkulturado. Li neniam drinkas nek prenas medikamenton. Ĉiutage li manĝas dufoje miksaĵon de rizo kaj maizo.

AMATOROJ

AMO AL YUHUA-ŜTONETOJ

Teksto de LI QIANG

Fotoj de YAN JIN

DIVERSKOLORAJ Yuhua-ŝtonetoj estas plej belaj.

Nankinano Wu Jialin (U Ĝjalin) kaj liaj edzino, filo kaj du filinoj ĉiuj ŝatas kolekti, studi kaj ĝui Yuhua-ŝtonetojn. Inter multaj kuriozaj ŝtonoj kaj envazaj miniatuuraj pejzaĝoj en ilia familio troviĝas vitra ŝranko kun vicoj da blankaj porcelanaj bovloj, en kiuj trempiĝas Yuhua-ŝtonetoj de diversaj koloroj kaj formoj. La mastro nomas sian domon domo de kuriozaj ŝtonetoj.

Wu Jialin naskiĝis en Nankino. Infanece li hazarde ricevis Yuhua-ŝtonetojn, estis tuj allogita de iliaj delikataj vejnoj kaj bone konservis ilin kiel trezoron. Iom post iom li absorbiĝis pri la kolektado de Yuhua-ŝtonetoj. En postlaboraj horoj li ofte vizitis Yuhuatai-monteton kaj

Fuzimiao-bazon kaj absorbite ĝuis brilajn kaj diafanajn ŝtonojn. Se li trovis bonajn, li tuj ilin aĉetis. Reveninte hejmen, li metis la ŝtonojn en bovlojn kaj longtempe ilin pririgardis. Fojfoje la familianoj kune diskutas pri nomoj de iuj ŝtonetoj.

Luhe-gubernio en la regiono de Nankino estas malebena topografie kaj havas multajn montetojn, kie troviĝas Yuhua-ŝtonetoj. La ŝtonetoj formiĝis el malvarmiĝinta silica magmo, kiu disŝprucis ĉe la erupcio de vulkano kaj fandis diversajn mineralojn. La ruĝa ŝtoneto enhavas titanon, la verda nikelon, la viola manganon. Ju pli da mineraloj, des pli bele. Nankino situas ĉe la kunfluejo de Yangzi-rivero kaj ĝiaj branĉoj. Post formiĝo tiuj kolorriĉaj kaj diversformaj ŝtonoj trapasis sennombrajn ŝanĝiĝojn de terkrusto, erozion de

vento kaj akvo kaj fine fariĝis ŝtonetoj ovalaj aŭ kukoformaj. Ili kun sablo kaj tero precipitiĝis en Luhe-gubernio kaj Yuhuatai de Nankino. Nuntempe agata mino vaste troviĝas en la naturo, sed la kolorriĉaj Yuhua-ŝtonetoj troveblas nur en la ĉirkaŭaĵoj de Nankino.

Libertempe s-ro Wu ofte vizitis Luhe-gubernion por serĉi ŝtatajn ŝtonojn. Tie iu monteto estas kovrita per grundo dika je kelkaj metroj. Sub grundo estas tavolo da sablo, en kiu troviĝas rulŝtonetoj. Yuhua-ŝtonetoj ja miksiĝas inter ili. Trovi Yuhua-ŝtonetojn estas tiel penige kiel lavi oron. Ofte okazas, ke en kelkaj tunoj da sablo troveblas nur unu peco da Yuhua-ŝtoneto. Tamen s-ro Wu havas persistemon kaj spite laciĝon serĉis en la monteto. Kiam li trovis ŝtoneton kun ĉarma koloro kaj eksterordinara figuro, li eksaltis de ĝojo kiel knabo.


Dum la kolektado, li ofte konsultas antikvajn librojn pri ŝtonoj kaj legas verkojn pri la historio de la ĉina pentrarto, pri la evoluo de la eŭropa belarto. Li ankaŭ ĉerpas nutraĵon el antikvaj ĉinaj poemoj, prozaĵoj, noveloj kaj mitoj, por plilarĝigi sian vidkampon, altigi sian estetikan kapablon kaj pli profunde studi la estetikan esencon de Yuhua-ŝtonetoj.

Fama franca artisto Rodin diris: "Arto devenas de la naturo." Yuhua-ŝtoneto bone enkorpigis la naturan belecon. S-ro Wu klasifikis centojn da raraj ŝtonetoj kolektitaj kaj okazigis ekspozicion. En dek ses montroŝrankoj, la ŝtonetoj estas aranĝitaj laŭ siaj naturaj formoj kaj figuroj kaj temas pri montoj kaj riveroj, astronomiaj fenomenoj, ĉinaj kaj alilandaj personoj, specoj de ŝminkitaj vizaĝoj en pekina opero, animaloj, objektoj ktp. Ĉion ĉi vizitantoj ekstaze admiris.

Inter tiuj ŝtonetoj iuj elstaras

S-ro Wu Jialin kaj lia filino






pro kvalito, ekzemple, troviĝas kurioza vinberforma ovoblanka ŝtoneto, tra kiu videblas violo, iuj pro siaj figuroj de fungo, brodita virina ŝuo, vinpoto, olelampo, konko ktp. Oni ne povus ne admiri la kreitaĵojn de la naturo.

Riĉaj koloroj kaj ĉarmaj figuroj de Yuhua-ŝtonetoj formas eksterordinare mirindan mondon

kun sennombraj brilaj bildoj. Inter liaj kolektaĵoj troviĝas ŝtoneto nomata Fuji-monto, simila al Fuji-monto ne nur forme, sed ankaŭ kolore. Tio ege admirigis multajn japanajn amikojn.

Troviĝas ankaŭ raraj ŝtonetoj kun ĝuinda artismo. S-ro Wu aranĝis per kvar ŝtonetoj bildon de kvar sezonoj kun prozaj poemoj. Okulfrapas ankaŭ okkoloraj ŝto-

netoj, kiuj simbolas liajn ok sonĝojn: infaneca sonĝo, junecca sonĝo, malĝoja sonĝo por serĉi la originon, iluzia sonĝo, mara sonĝo, sonĝo de serĉanto, sonĝo de surfotabulisto, sonĝo de la sep koloroj. La ekspoziciitaj ŝtonetoj portas la senliman revon de s-ro Wu kaj imagigas spektantojn. ■



Ravino ĉe neĝmonto

Foto de **REN SHIYIN**

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九四年第二期

(本刊代号: 二——九一五) 国内统一刊号: CN11 1339 / G2